

OOMOTO INTERNACIA

Monata Organo
de
Oomoto-Movado kaj de Universala Homama Asocio

Junio

1935



La Sanktejo GEKKJUU-DEN

staras sur la altaĵo de Oomoto-Teritorio en Kameoka. Ĝi estas konstruita (en 1928) nur el ŝtono kaj ĝia baza ŝtonaro estas sendita el ĉiuj partoj de Japanujo.

Redakcio kaj Administracio :

Oomoto Centra Oficejo, Kameoka (Kioto-hu) Japanujo

OOMOTO-MOVADO

DEVENO kaj CELO: La vorto **Oomoto** signifas Grandan Originon. La Granda (aŭ Origina) Dio, Kreinto de la Universo, aperis en la sankta loko Ajabe (Japanujo) en la jaro 1892 kaj deklaris pere de Sinjorino **Nao Deguĉi** Sian planon por la reformo de la mondo. Ni nomas Ĝin la **Fondintino** de Oomoto. La Dia Reformplano konsistas en la starigo de pli perfekta mondo, verdire la ĉielregno baldaŭ venos sur la tero. Oomoto-Movado fervore laboradas por la baldaŭa efektivigo de la Dia Plano.

NUNA STATO de OOMOTO: Post la ĉieliro de la Fondintino, nia movado daŭrigas la agadon sub la aŭtoritata gvidado de Majstro **Onisabro Deguĉi**, adoptita filo de la Fondintino. Li estas eksterordinara homo, vera geniulo, eminenta en diversaj artoj kaj sciok. La nuna mondo baraktas meze de ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj aliaj malsanoj. Ni firme kredas, ke nia spirita Gvidanto estas la de Dio destinita Homo, sole kapabla piloti la ŝipon de la homaro el inter la rifoj de hodiaŭo al la paca haveno de morgaŭo.

La Centro de Oomoto sin lokas en Ajabe, la Administrejo en Kameoka (Japanujo). Lokaj Centroj estas en Mukdeno kaj San Paŭlo, kaj pli ol 2,000 filioj ekzistas ne nur en Japanujo sed tra la mondo. Krom pluraj japanlingvaj organoj, monata gazeto «Oomoto Internacia» aperas en Kame-

oka. Nia Doktrino estas tolerema: ni unuiĝas kun Orientaj potencaj spiritmovadoj kiel Tao-Yuan kaj Universala Ruĝsvastika Asocio; ni ankaŭ kunlaboras kun pluraj spiritaĵaj kaj religiaj movadoj — Tsaili-Hui, P'uch-Hui, Anĉing-Chao, Lamaismo en la Oriento kaj Blanka Fratara, Grandega Mond-Kristana Spiritualista Ligo en la Okcidento. Ni ankaŭ fondis Universalan Homaman Asocion kaj Ligon de Religioj, kiuj bone laboras por la mondopaco. Ni vokas al la tutmondaj gesamidanoj je komunlaborado por pli bona kaj pli bela estonteco.

MAKSIMOJ: 1) Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respiegulas la **Korpon de Dio**. 2) Konsideru la seneraran funkciadon de la Universo kaj rekonu la **Forton de Dio**. 3) Konsideru la koron de la vivantaĵoj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la **Animo de Dio**.

ĈEFINSTRUO: Dio estas Spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuiĝas Dio kaj homo, tie ekestiĝas senlima forto kaj aŭtoritateco.

DEVIZOJ: 1) Harmonio inter Dio kaj homaro. 2) Instruo pri Dia Vero. 3) Fundamenta moralo. 4) Sankta karaktero de la misio.

PRINCIPOJ: 1) **Pureco** de animo kaj korpo. 2) **Unuigo** inter klasoj de la socio. 3) **Optimismo** pri la aranĝo de Dio. 4) **Progresemo** por la socia plibonigo.

UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

CELO de UHA estas fratigo de la homaro sur la bazo de la Homaranismo. UHA celas plie labori por la efektivigo de la lumplena mondo, kie feliĉo kaj ĝojo floras por eterne. La homaro konsistas ja el gefratoj, kaj konkordo devas regi la tutan teron. Realigo de tiu ĉi idealo estas la plej alta celo de UHA. En la moderna epoko, la vivcirkonstancoj tute aliformiĝis, kaj la homa koro ĉiutage malpliboniĝas. Se oni permesas, ke tiu ĉi procedo daŭru, alvenos neevitebla katastrofo kaj la homaro multe suferos. Pro tio, ni kuraĝe eklaboru por disfaliĝo de la muroj inter nacioj, rasoj kaj religioj. Sur la bazo de Homaranismo, ni devas forigi la nunan kaoson kaj efektiviĝi pli luman, pli trankvilan, pli belan kaj pli feliĉan mondou sur la tero. Jen estas la celo de UHA.

UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO estas fondita, laŭ la iniciato de S-ro Onisabro Deguĉi en Julio, 1825. La Centro estas en Kameoka; Majstro O. Deguĉi estas la Prezidanto kaj Sinjoro

Hidemaru estas la Vicprezidanto.

Kvankam ĝia historio estas mallonga, la movado disvastiĝis kun mirinda rapideco sur la tuta tero: ĝi havas Azian Centron en Tokio, Manĉurian Centron en Mukdeno, Brazilan Centron en Uberlandia; krome pli ol 1,200 filioj troviĝas en la tuta mondo. Manpremanate aŭ unuiĝinte kun samcelaj movadoj en Eŭropo kiel ankaŭ en Azio, UHA klopodas kunfandi la tutan homaron en unu familian rondon kaj efektiviĝi harmonian kunvivadon kaj kunprosperon de la tuta homaro «Zinrui-Aizen-Sinbun» estas organo por Japanujo: ĝi aperas en Tokio tri foje monate po ĉ. miliono da ekzempleroj. «Oomoto Internacia» estas internacia monata organo en Esperanto: ĝi fervore batalas por disvastigo de Homaranismo.

ALIGŬO al UHA estas libera kaj senpaga formalajo. Dezirantoj skribu rekte al la Centra Oficejo la nomon, adreson, aĝon kaj profesion.



Majstro Onisabro Degučī



«Marumage» post la edziniĝo

«Simada» por edziniĝonto

Du tipaj hararangoj de japaninoj.

OOMOTO INTERNACIA

MONATA ORGANO de OOMOTO-MOVADO kaj de UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Jaro 11

Junio 1935

N-ro 6 (118)

Ĉefredaktoro: Koogecu Nišimura. Nia Devizo: «Internacia Redakcio — Internacia Leĝantaro». Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto. Manuskriptojn ne petitajn ni ne resendadas. Honorario ne pagebla; por artikoloj publikigitaj ni sendas pruvekzemplerojn. Pri abonkondicoj, ktp. vidu la lastan paĝon.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Kio estas la Civilizita Mondo?

— Kacuo Osaki —

«..... sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej krudaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistas nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj...»

Tiaj kruelaĵoj prezentiĝis en Norda Eŭropo, kiam naskiĝis Ludoviko Lazaro Zamenhof. De tiam forpasis kelkdek jaroj.

Kaj nun, kia estas la mondstato? Konferenco post konferenco, kun nenia efiko. Denove ĉiuj landoj konkurence pligrandigas sian armadon por «sin ĵeti kiel plej krudaj bestoj» kontraŭ aliaj. La dua Mondmilito minacas eksplodi. Kio estas la kaŭzo? Ĉiam ankoraŭ ĝi estas sama al tiu de la barbaraĵo en Bjalistok. Dum la forpasintaj kelkdek jaroj la realo neniam pliboniĝis. Kontraŭe la malpacigo fariĝas multe pli grandskala kaj kruela, dank' al progreso de la scienco.

La materia civilizito atingis la zeniton de prospero, sciencistoj fanfaronas dirante, ke finfine la scienco subigis la naturon. Sed kio estas la civilizito? Kio estas la civilizita mondo?

Majstro Onisabro Deguĉi diras en sia verko «Rakonto el la Spirita mondo»: «Nenio estas pli barbara ol batalado kun malamo; sekve, laŭ amplekseco de amo, kiun oni havas en si, decidiĝas ĉu civilizita homo aŭ barbaro.»

El tiu ĉi vidpunkto, kiu kuraĝas aserti,

ke la nuna mondo estas civilizita? Ĉu oni povus trovi eĉ peceton da harmonio de animoj ie sur la tero? Ju pli progresas tielnomata civilizito, des pli malprogresas la civilizito en vera senco. Aperis aeroplano, radio kaj malaperis humaneco, amo el la homoj. Kaj nun la homaro profundigaĝas en akriĝado de siaj bataliloj, por fari plej barbaran buĉadon. Terura «civilizita mondo»! Laŭ la supraj vortoj de la Majstro, oni povas diri, ke en la nuna epoko la homaro fariĝis terure barbara, kvankam ĝi fiere nomas sin civilizita.

La mondo, kiun la homaro sopiradis reve dum longlonga tempo, ne estas barbare civilizita mondo, kiel la nuna, sed estas ja tia, kie ĝi povos vivi komforte en plena harmonio, eĉ se tie ne troviĝos aŭtomobilo, elektra lampo ktp. Tia ja estas vera «civilizita mondo». Sed neniam venos tia sopirata mondo, dum la popoloj malamas, suspektas kaj ĵaluzas unu la aliajn, kiel ajn progresos la civilizito kaj la scienco.

Ĉu por la homaro pli gravas la maldika streko de la landlimo kaj la koloro de la haŭto ol ĝiaj propraj paco kaj feliĉo? Kiomfoje la homaro intencas ripeti la barbaraĵojn, kiuj dolorigis la koron de la sentema knabo en Bjalistok?

Jen instruas poemeto de Ŝinjoro Hide-maru Deguĉi:

Havante amon
Ja kiel inter patro
Kaj la infanoj,
Homaro povas vivi
En paco ja eterne.

ORA SPEGULO

de Majstro Onisabro Deguĉi



«Parolo estas arĝento», sed «Parolo en Ora Spegulo estas **diamanto**». Ora Spegulo estas kolekto de l' vortoj de Majstro O. Deguĉi. La Red.

«Anŝin-ricumei»

Anŝin-Ricumei 安心立命 estas laŭlitere *trankviligi koron, starigi* (aŭ longigi) *vivon*. Ĉagrenaj zorgoj dolorigas la cerbon. Ekspluatante la cerbon oni ne povas trankviligi sian koron. Maltrankvila koro konsumas la vivon. Nenio estas pli venena ol ĉagrenoj kaj zorgoj. Vidu la spekulaciistojn. Ili eĉ ne havas unu tagon da trankvileco, sekve ilia vivo estas mallonga.

Personeco

Personeco estas reformebla nur per la saĝeco de kredo. La personeco transvivas en la spiritan mondon. La homa vivo en la fizika korpo konsistas en rafinado kaj edukado al la personeco. Budaismo instruas pri «senmorteco de la animo», sed tio estas la teorio de l' anima senmorteco *ignoranta la postvivecon de la personeco*. Ekz. kiam oni bruligas cigaron, ĝi fariĝas aŭ fumo, aŭ cindro: ĝi restas ie sub alia formo. Tia teorio ignoranta la supervivecon de l' personeco estas falsa.

Varipensa homo

Revelacio al homo, kiu estas okupata per konstante variaj pensoj, indikiĝas pere de sonĝo. En sia vekiga stato, li estas malhelpata de diversaj pensoj por klare percepti la internofluon de Dio, kiel diversaj sonoj de radio malhelpas enaŭskultiĝon. Tia sonĝo nomiĝas «mirakla aŭ sankta sonĝo».

Miskredo

Kredo estas tute senbrida. En la vojo

de Dio, miskredo kaj tromemestimo estas plej danĝeraj. Miskredanto ne povas vidi eĉ *trabon en sia okulo*, ĉar li kredas, ke lia kredo estas vera, ne volante akcepti eĉ afablajn admŝnon kaj averton de l' aliuloj. Atingante al senelirebla punkto finfine, li mem rimarkos sian eraron kaj kapitulacos. Li rigardos returnen kaj trovos, ke la Lumo estis en la malantaŭa direkto kaj reiros al la ĝusta vojo.

Ĉiuokaze, tamen, kiel ajn oni miskredus, oni nur atentu ne disiĝi de Dio. Tio sola estas plej grava. Ĉar venos iam la tempo en kiu oni per si mem rimarkos sian eraron. Estas neutile riproĉi aliajn, ke ili eraras en kredo. Ĉar neniuj estas libera de ioma miskredo. Ankoraŭ hodiaŭ neniuj posedas perfektan kredon pri Dio.

Kredo kun plena Fido

Sankta loko, kie oni predikas Dian Instruon estas *Jaĉmata*, aŭ purgatorio. Oni supreniras en la Regnon de Dio post kiam oni aŭdis tie la Instruon de Dio. Dionfida koro iras al la Ĉielo. Ĉar la Ĉielregno estas la mondo de *volo-kaj-nocio*, nur se oni kredus kun plena fido, eĉ se *miskredus* kun plena fido, oni povus eniri en la Ĉielregnon respondan al sia volo-kaj-nocio. Eĉ aŭskultante ĉiam altevangelian Instruon, se oni pridubus tion, oni ne povus eniri en la ĉielregnon. Homoj kun malprofunda kredo kaj miskredo, komprenos sian eraron nur post eniro en la spiritan mondon, kaj homoj kun konvinkita kredo de plena fido eĉ pri superstiĉo eniros en la ĉielregnon

respondan al sia *volokaj-nocio*. En la ĉielregno kie kelkaj loĝas, ili kredas, ke ilia grupo sola estas la tuta ĉielregno, kaj ne scias, ke ekzistas ankoraŭ diversaj grupoj ĉielaj, grandaj aŭ malgrandaj.

Kiel mi klarigis en la «Rakontoj el la Spirita Mondo», ekzistas diversaj grupoj en la Spirita Mondo, laŭ gradoj de enloĝantoj je l' *intelektokaj-prudento* devenanta de Dio. Kiam iu fariĝas supera je la intelektokaj-prudento, oni venas de supre por lin enkonduki en pli altan grupon. Tiamaniere la homo iras senlime altiran vojon de progreso.

Unutaga sinkulturado

«*Se mi lernis la vojon matene, mi estos kontenta jam morti vespere*» — tiel la proverbo diras. Tio signifas la Vojon al la Spirita Mondo: se oni havus profundan informon pri la spirita mondo, oni estus kontenta kiam ajn morti, ĉar oni bone scias kien oni iros post la morto. Nur mallumo kuŝas sur la vojo de tiuj, kiuj ne scias la ekziston de la spirita mondo. Ili devos vagi en terura labirinto. Dum la surtera vivo, la homoj jam devas bone informiĝi pri la vojo en la spirita mondo. Oni diras ankaŭ, ke *unutaga sinkulturado en la materia mondo estas eĉ pli, ol centjara sinkulturado en la postmorta, spirita mondo*. Tio pravas, sed estas egale en proporcio ĉar la vivo en la spirita mondo estas tiom longa kaj tiu en la fizika mondo estas tiom mallonga: unu tago da surtera vivo respondas al centjaro da vivo en la spirita mondo.

Supernatura Vidpovo

Pri miaj animokuloj oni miskomprenas, ke mi vidas en ĉiu momento la fenomenojn de l' spirita mondo. Sufiĉas vidi la aferojn nur de la materia mondo, kaj se, senbezone, vidiĝus al mi ankoraŭ multaj fenomenoj el alia mondo, tio estus, ĉu ne, tre ĝenega afero! Sed kiam ajn mi nur

volas, mi povas vidi kion ajn laŭ Providenco, ĉu proksiman, ĉu malproksiman. Ekzemple, se mi nun volus scii vian pasintecon, mi povus vidi malantaŭ vi la reprezentadon de via tuta travivaĵo, kiel filmon sur ekrano. Mi tute ne bezonas informiĝi pri la travivaĵo aŭ kariero de tiuj, kiuj venas al mi por la unua fojo. Novaj vizitantoj faras al mi sinprezentadon kelkfoje per mensogo, kaj kiam la kontraŭaj scenoj aperas malantaŭ ili, mi ne povas deteni subrideton. Estas tute ne-eble al mi mensogi. En tia okazo, mi kun kompatemo lasas ilin mensogi... por kelka tempo ĝis kiam ili mem ekrimarkos sian malvirtecon. Antaŭ longa tempo iu sinjoro venis al mi kaj kiam li sin prezentis al mi *kiel bonan sinjoron*, mi estis surprizita vidante malantaŭ li la tragikan scenon, en kiu li mortigas homon. Sed de tiam ankoraŭ ĝis hodiaŭ li fervore preĝas al Dio. Kiam li elaçetos la tutan pekon, li fariĝos bona sinjoro en la vera senco. Por tiel diri miaj animokuloj vidas pli-ĝuste «parol-filmon» ol simple «kinon», ĉar aŭdiĝas ankaŭ voĉoj. Multaj afable invitas min al diversaj famaj kaj belaj lokoj, kaj kvankam pro afableco mi ne ĉiam malakceptas, tamen estas miloble pli oportune por mi vidi ilin kuŝante sur la lito... Kaj pri viaj agoj kaj paroloj mi ne bezonas vidi per animokuloj, nek aŭdi per animoreloj, ĉar viaj gardodioj venas al mi por informi.

Animokuloj

En la banloko *Jugaŝima* mi verkis poemojn pri 135 diversaj famaj vidindaĵoj kiel mi vidis per miaj animokuloj. Al animokuloj ĉio aspektas pli bela, ol efektive, samkiel ekz. eĉ malgranda ruiniĝinta kabano aperas tre bela sur foto. Miaj animokuloj estas indiferentaj ne nur pri distanco, sed ankaŭ pri tempo. Mi povas vidi estintecon same kiel estontecon. Se ne, mi ne povus gvidi vin ĉiujn, ĉu ne? Vi ne povas vidi estontecon, kaj tial estas bone, ke vi sekvu min ĝentile, silente ka obeeme.

Trad. N. Tsuruzo

Niaj Filantropiaj Suverenoj

— D-ro Zennosuke Cujî* —

1

«Justeco estas la gvid-principo kiu regas inter la Suvereno kaj la regataro, kaj tamen en sentimento ili estas kunigitaj kiel ili estas gepatroj kaj gefiloj. Tiu ĉi granda principo konsistigas ja la fundamenton de la nacia civito de la Imperio, senkompara en la tuta mondo.»

La supra citaĵo estas parto el la Imperiestra Reskripto proklamita okaze de la Surtroniĝa Ceremonio de l' Imperiestro Taiŝo en 1915.

La Imperia Familio tenas ĉiam grandan kompaton por la regataro kiel por la infano, dum la popolo adoras kaj respektas la Imperian Familion kiel familion de siaj gepatroj. Tiu ĉi sentimento estas la karakterizo de nia Nacia civito, konservata por 2600 jaroj: de ĝia fondiĝo ĝis la nuna tempo, kaj la dispenetriĝo de tiu ĉi granda spirito kuranta tra la vejno de la nacia vivo, kunportis, kiel ĝiajn enkorpiĝojn, multnombron da okazoj, en kiuj la Suverenoj montris bonvolan bonfaron al la popolo de generacio al generacio kvazaŭ milda pluvo benanta la verdan paŝtejon, kaj aliflanke ĝi manifestiĝis kiel sincereco kaj sindediĉo flanke de la popolo, volanta plenumi riskon eĉ ensalti en nesondeble profundan maron aŭ morti kavalirece sur batalkampoj, se tio estus por la bono de la Imperia Familio. Verdire multnombraj okazoj de tiu ĉi bela spirito estas en kronikoj.

Kiel la titolo signifas, la Imperiestro Nintoku (la 16a Dinastio, 313-399 p.K.) ĉiam estis zorgema pri la facileco kaj kom-

forteco de l' popol-vivo. Unu tagon suprenirinte sur la supron de la Imperia Palaco li faris esplor-rigardon al la viv-stato de la popolo, kaj je sia granda ĉagreniĝo, li trovis la fakton, ke nur mizeraj strioj de fumo leviĝas el la kuirejoj de la vilaĝanoj. El tiu ĉi kompatinda vidaĵo, la Imperiestro enketis kaj informiĝis pri la de malriĉeco suferanta kondiĉo de la popolo. Tuj la popolo estis liberigita de ĉiuspecaj impostoj por tri jaroj sinsekve, kaj samtempe ĉiuj provizoj kaj ĉiutagaj necesajoj en la Imperia Familio plenumiĝis, laŭ ordono, en ekstrema ŝpareco. Pro tio, rompitaĵoj tegmentoj aŭ falintaj bariloj kaj multaj aliaj partoj de la Palaco mizerege detruigintaj, restis senripare, kaj tie kaj tie ĉi la pluvo komencis enŝteliĝi, kaj tamen la Imperiestro neniom plendis pri malkonveneco nek pri senkomforteco, sed preĝis kaj preĝis nur la alvenon de la tago kiam la vivo de la popolo fariĝos prospera.

Intertempe tri jaroj forpasis, kaj la Imperiestro supreniris kun la Imperiestrino sur la altaĵon de la Palaco kaj je sia granda ĝojo, ili vidis kamentubojn de la vilaĝanoj eligantaj grandiozan fumon, kaj sciis la trankvilecon kaj pacon de la vivo de l' popolo.

Tiam la Imperiestro sin turnante al la Imperiestrino diris plej kontente, «Ni estas riĉaj». La Imperiestrino ne povante kompreni la signifon, demandis, «Kial, mia Moŝto! La Palaco estas efektive ne enloĝebla kaj la enfluigo de pluvo difektas niajn vestaĵojn, kaj tamen ĉu ni estas riĉaj?» Tiam la Imperiestro klarigis dirante, «Ĉar la fumo leviĝas el la kuirejoj de la popolo, estas sendube, ke la popolo estas bonefartanta, kaj tial, ĉar ili estas riĉaj, ankaŭ ni estas riĉaj.»

* D-ro Cujî estas direktoro de la Historikompila Instituto de la Tokio Imperia Universitato, kaj tiu-ĉi artikolo estas la traduko el la okt-nro (1934) de «The Japan Times & Mail».

Kiam la Imperia Palaco estis ĵus renovigota, la popolo alkuris por labori, kaj ĉiutage kaj ĉiunokte ili enportis lignojn kaj aliajn konstru-materialojn, kaj fervore okupiĝis en konstruado al la nova Palaco. Dum tre mallonga tempo finkonstruiĝis grandioza Palaco.

En tiuj malnovaj tagoj, aferoj estis tre simplaj, tute malsame kun la modernaj tagoj, kaj tamen, tio estas plej bela rakonto ilustranta la majestan virton de la Imperiestro Nintoku, kaj la kaŭzo kial la postmorta titolo nomiĝas Nintoku (kompatema virto), verdire estas trovebla en tia bonfara administrado de la Imperiestro Nintoku.

Estas bone-konata rakonto pri bonvola kompatemo montrita de la Imperiestro Daigo (la 60a Dinastio, 897-930 p.K.); anekdoto, ke en vintra nokto la Imperiestro demetis negliĝon por ke lia Moŝto povu persone sperti la veran doloron de malsato kaj sufero de la popolo.

Estas alia simila rakonto ankaŭ pri la Imperiestro Iĉiĵo (66a Dinastio, 986-1011 p.K.) kiu en ekstreme malvarma nokto eliris senvestite el la ĉambro. La Imperiestrino kun suspektemo demandis la kialon. La Imperiestro diris, «Tio ne estas mia deziro, ke mi dormas en varmeĉo dum mia popolo tremas en malvarmeĉo.»

Daŭre de tiu tempo la bonvola zorgemo restis kiel glora ekzemplo por sinsekvaj Imperiestroj. Dum la regado de la Imperiestro Gokomjo (la 110a Dinastio, 1643-1654 p.K.) poemo estis verkita, en malvarma tago de malfrua vintro, de la Imperiestro por la memoro de la anekdoto de la Imperiestro Daigo. La popolo en tiu tempo, aŭdinte tion ĉi, estis korsĉirita kun larmoj pro dankeco al la bonfara koro de la Imperiestro.

Ankaŭ la Imperiestro Nakamikado (la 114a Dinastio, 1709-1735 p.K.) verkis poemon kun la titolo «Apud la fajrujo en la nokto», kiu sekvas jene:

«*Samuki Yo ni,*

Nugisi mikesi no tamesi omo

Wasurete saranu umorebi no moto!!»

«Forgesante pri la bonfaro de mia prapatro,

Kiu senveste restis en vintra nokto,
Mi hontinde avidas la varmecon apud fajrujo.»

Nia nacio staris depost ĝia fondiĝo en Jamato dank' al la Imperiestro Ĵimmu, dum 2594 jaroj, kaj la seninterrompa linio de la Imperia Familio, de la unua Imperiestro Ĵimmu ĝis la nuna generacio, atingas la 124-an dinastion, kaj nia nacio sentas grandan fieron pri la belega nacia karaktero havanta tian integralan devenon de la Imperiestro por tempoj eternaj.

Dum la senfina ŝanĝiĝo de tempo, la nacio renkontis sennombran sortŝanĝon de l' vivo, tiel kalejdoskopon kiel la alternado de kvar sezonoj de l' jaro, kaj estis tempoj, kiam mallumaj nuboj kuŝis ĉe la piedoj de brilaj kaj prosperaj tagoj en naciaj aferoj. Tamen, la neapartigebla, kohera sentimeco tenata inter la Suverenoj kaj la regataro, simila al tio, kio regas inter gepatroj kaj gefiloj, kreskis jaron post jaro, kaj aldonis por ĉiam multĝantan gloron al la nacia historio.

La aŭtoro sentas grandan honoron, respektoplene prezentante tie ĉi kelkajn elstarajn, bonfar-laborojn de la Imperia Familio kiel elokventan ateston pri ĝia profunda zorgemo al la popolo.

II

Laŭ la *Nihon Ŝoki*, unu el la plej malnovaj kronikoj de la nacio, dum la regado de la Imperiestro Kinmei (la 29a Dinastio, 539-571 p.K.), inundo terure difektis diversajn provincojn de la lando kaj la enloĝantoj en tiuj difektitaj distriktoj suferis malsatmizeregon. Tial la Imperiestro liberigis ilin de sufero per malavara distribuo de rizo kaj aliaj nutraĵoj inter la suferantoj.

Tio ĉi estas la unua okazo en kroniko

pri la bonfara laboro plenumita de la Imperia Familio. Eĉ antaŭ ol tio, estas supozeble, ke la similaj laboroj estis farataj de la Imperia Familio, sed nuntempe estas nenia rimedo por ekzakte klarigi pri tiuj fruaj laboroj, ĉar iliaj historiaj kronikoj ne estas tiel aŭtentike ordigitaj.

Post tio ĉi estis alia notinda laboro farita de Princo Ŝotoku por fondi Ŝokoin, en la jaro de Surtronigo de Imperiestro Suiko (la 33a Dinastio, 592-628 p.K.). La Princo konstruigis la Ŝokoin en la proksimeco de la Ŝitennoĵi-templo de Naniŭa (nuna OSAKA) kaj komencis help-laboron por vidvinoj, orfoj, malriĉuloj kaj malsanuloj. La Ŝokoin havis kvar fakojn de laboro. La unua nomiĝis «Sejakuin»; senpaga kuracejo kiu zorgis pri kreskigo al medicinaj plantoj en farmo kaj pri medikament-manufakturo, kaj la medikamentoj tiamaniere produktitaj disdoniĝis senpage kiam ajn malsanuloj postulis ilin. La dua sekcio nomiĝis «Rjobjoin»; almoza hospitalo kie ĉiuj senhelpaj malsanuloj estis flegataj kaj provizitaj per manĝaĵo kaj trankvilo, plie ĉiuj malsanaj monaĥoj ricevis ŝirmejon.

La tria divido nomiĝis «Hiden-in»; almozulejo por senhelpaj malriĉuloj, oferanta zorgon al mizeraj personoj per ŝirmejo kaj manĝaĵo, kaj kiam ili sufiĉe resaniĝis kaj revigliĝis, ili estis okupigitaj en diversaj laboroj en la Ŝokoin.

La kvara divido nomiĝis «Keiden-in»; budaisma seminario por propagando de instruoj de Budaismo.

Fervora preĝo de Princo Ŝotoku estas esprimita en la libro kompilita de li mem, titolita «Juimakjoŝo» (komentario pri *Vimalatirrti-virdesa sutra*) kaj ankaŭ en alia lia verko kun la titolo «Ŝomankjoŝo» (komentario pri *Viuha-Pariprccha sutra*) en kiu li diras, ke li volonte fordonus sian korpon, vivon kaj havaĵon se por savo al la homaro. Tio signifas la soci-servon per sinofero, kaj en la lumo de tiu ĉi filantropia spirito estos facile agnoskebla la tradicio koncerne

al Princo Ŝotoku.

III

Laŭ la forpaso de l' tempoj, la sinsekvaj Imperiestroj havis ĉiam profundan atenton pri la bonigo de la viv-kondiĉoj de la popolo, kaj tial diversaj institucioj fondiĝis kaj ankaŭ filantropiaj laboroj plenumiĝis de la Imperia Familio generacion post generacio.

Laŭ la Taiŝo Ricurei (leĝoj kaj reguloj), kiu ajn, kun aĝo de 80 jaroj aŭ gravaj invalidoj estis privilegiitaj per unu servisto por ĉiu. «Gravaj invalidoj» implicas tiujn, kiuj suferas de lepro aŭ alia malbenata malsano, ankaŭ frenezo, kriplo je ambaŭ piedoj, aŭ blindeco je ambaŭ okuloj; kaj 90-aĝuloj estis akompanataj de du servistoj por ĉiu respektive, kaj kvin servistoj por 100-aĝuloj respektive.

Tiuj ĉi servistoj elektiĝis el inter la infanoj kaj nepoj de la malsanuloj aŭ maljunuloj, sed se troviĝus neniu tia, en tia okazo ili elektiĝis el parencoj, kaj se denove ne troviĝus tiaj parencoj, la servistoj elektiĝis el inter sen-parenuloj.

Fiksiĝis ankaŭ reguloj pri la zorgo por vidvinoj, orfoj, malriĉuloj, soluloj, malsanuloj kaj maljunuloj. Vidvoj implicas senedzinajn virojn de pli ol 61-jara aĝo, vidvinoj implicas senedzajn virinojn de pli ol 50-jara aĝo; orfoj, senpatrajn infanojn de malpli ol 16-jara aĝo; soluloj, seninfanajn personojn de pli ol 60-jara aĝo, kaj malsanuloj ampleksas idiotojn kaj kriplulojn kun rompita ischio aŭ unupiedulojn.

Tiuj ĉi personoj devis esti subtenataj de l' proksimaj parencoj, sed en okazo kiam neniu tia troviĝis, la subteno devis esti donata de la komunumo. Ankaŭ malsanaj vojaĝantoj devis esti flegataj kaj medikamenton ili ricevis de vilaĝanoj, kie ili atingis. Krom tio, estis help-rimedo por la suferantoj de inundo, de pluveco, kaj mizerlikolto kaŭzita de akridoj, kaj fondiĝis la institucio de Giso (help-grenejo). Giso signifas konservejon por helpentrepreno,

kien la tuta popolo devis oferi certan kvanton da rizo konforme al regulo, kaj tiamaniere, la triĉbutoj konserviĝis por la okazo de ekstrema mizerego.

Estas senbezone diri, ke la farado de tiuj ĉi reguloj estis plenumataj de la registaro, kaj tio ne estis rekte koncernata de la Imperia Familio. Tamen, en tiu tempo la sistemo de ŝtadadministrado ne estis tiel komplikita kiel en modernaj tempoj, kaj tial preskaŭ ne troviĝis limo distinganta inter la institucioj sub la kontrolo de la Imperia Familio, kaj tiuj sub la kontrolo de la registaro.

En la 7a jaro de la Tempo-epoko, dum la regado de Imperiestro Ŝomu (la 45a Dinastio, 742-749) vidvinoj kaj orfoj ricevis necesajojn de la Imperia Familio, kaj malsanuloj ricevis flegadon, kaj pri la donacajoj tiamaniere distribuitaj estas en kronikoj en la antikvaj dokumentoj nun konservataj en la Ŝokoin en NARA*.

La Imperiestrino Komjo, edzino de la Imperiestro Ŝomu, estis tre bonfarema, kaj ĉiam estis plena de helpemo al suferantoj. Tial ŝia moŝto havis senpagan kuracejon, kie malsanuloj ricevis klinikan kuracadon, kaj ĉiujare la dirita kuracejo venigis medikamentajn plantojn el diversaj partoj de la lando.

Pri la fakto, ke tiuj ĉi help-laboroj faritaj de la Imperiestrino estis pura ago de sin-fero kaj sindediĉo, la sekvanta rakonto servos por la plej rimarkinda atesto: — Unu tagon per mistera revelacio, la Imperiestrino inkliniĝis surgenuiĝi por sincera preĝo, kiu inspiris al ŝi la deziron konstrui banejon, en kiu mil personoj povus sinsekve laviĝi, kaj kie ŝi purigos malpuraĵon de ĉiu el la banantoj. Al tia eksterordinara deziro de la Imperiestrino, la Imperiestro kaj korto-oficeroj energie petegis ke ŝi rezignu. La Imperiestrino, tamen, firme decida pri sia intenco ne volis aŭskulti iliajn vortojn, kaj daŭrigis lavadon kaj fine la nombro de personoj ĝis tiam purigitaj atingis 999,

Kun ankoraŭ unu alia bananto, la Imperiestrino atingus la celon! Sed kia mirinda ironio! La lasta, kiu petis banon estis neniu alia, ol mizera leprulo. Lia pusanta haŭto kaj malbona odoro estis tro severa provo por la sincera koro de grandanima Imperiestrino. Ah! Kun nur unu plia persono la nombro de l' dezirita unu milo estos kompletigita finfine.

Tamen, la Imperiestrino, komencis decide lavadon al la dorso de la lasta bananto, kaj purigis lian korpon. Tiam la leprulo diris, «De longe mi suferis de tiu ĉi malbelega malsano. Iam mi aŭdis de granda kuracisto, ke se mi trovus personon, kiu bonvolus suĉi la puson for de mia korpo, mi certe resaniĝus de tiu ĉi malsano, sed tre malĝojinde, mi ne povis ĝis nun trovi tiel kompateman personon en la mondo. Kaj nun mi petegas al Via Moŝto, ke vi bonvolu savi mian vivon, ĉar Via Moŝto havas senliman kompatemon por la mizeruloj kaj suferantoj.»

Ege stimilita de l' homama spirito, la Imperiestrino komencis suĉi la puson kaj sputi ĝin el sia buŝo, purigante la tutan korpon de la leprulo; de la kaposupro ĝis la maleolo. Post tio la Imperiestrino avertis al li, ke li ne diru tion al aliaj.

Subite, la leprulo estis ĉirkaŭita per brileganta aŭreolo diranta: «La Imperiestrino purigis la malpuraĵon for de *Aksobhja* (Sen-Indigna-Budao en ekstazo), kaj admonis diri tion al neniu.»

Hodiaŭ staras tie sanatorio por lepruloj, nomata Ĵuhaĉiendo ĉe Kitajama apud Hanĵaji-templo en la norda parto de NARA*. Ŝajnas tre evidente, ke tiu ĉi sanatorio estas establita de Ninŝo, budaisma pastro menciita ĉie en la komenca ĉapitro en rilato kun la filantropiaj laboroj faritaj de Princo Ŝotoku, por savo kaj zorgo al lepruloj.

(daŭrigota)

Trad: N. TAZUO

* antikva ĉefurbo de Japanujo, nun bela park-urbo.

Ideoj tra Esperantujo

*La lingvo benata montriĝas al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela.
Kaj same fidelaj al hejma altar',
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.*

A. GRABOWSKI



Pri la Influo de Esperanto sur Nacilingvoj

Ĉu en nia tempo Esperanto jam havas ian influon sur la vivantaj lingvoj?

Kiel tia influo estas rimarkebla?

Jen demandoj, kiujn mi dezirus fari al esperantistoj de diversaj landoj. Kvankam unuavide tiuj demandoj povus ŝajni naiva donkiĥotaĵo, mi mem kuraĝas tuj respondi: Jes.

Jen ekzemplo: En Brazilo oni konservadis tre obstine dum centjaroj la etimologian ortografion, kiu uzis literojn nenecesajn kiel *w* kaj *y*, multajn literojn, duoblajn konsonantojn el kiuj nur unu sonis, k.s.

La eminenta brazila akademiano Medeiros e Albuquerque lernis Esperanton antaŭ 30 jaroj. La absolutaj simpleco, fonetikeco kaj reguleco de la Esperanta skribmaniero vekis en li abomenan malŝaton al la nenecesaj komplikajtoj de nia nacia ortografio. Li elpensis mem specialan fonetikan ortografion kaj ekuzis ĝin. Senĉese li aperigis artikolojn kontraŭ la nacia ortografio kaj ĝin komparis kun la Esperanta. Iam li prezentis al la Brazila Literatura Akademio jenan proponon:

Li instruus la Esperantan skribmanieron dum duonhoron al 10 personoj neniam antaŭe aŭdintaj pri Esperanto, kaj poste li diktus 50 Esperantajn vortojn al tiuj dek personoj. Samtempe la Akademio elektus dek el siaj plej eminentaj verkistoj kaj s-ro Medeiros diktus al tiuj dek akademianoj 50 vortojn

en la nacia lingvo. Se tiuj kleruloj, kiuj lernas la nacian lingvon de multaj dekjaraj, skribus tiel korekte kiel la 10 aliaj, lernintaj nur dum duonhoron, neniam plu s-ro Medeiros kontraŭbatalus la tradician ortografion de la portugala lingvo.

Nia glora Akademio ne akceptis la proponon.

La fama verkisto tamen daŭrigis sian viglan bataladon, kaj fine li venkis.

Per dekreto No 20.108, de la 15a de Junio 1931, la skribmaniero en Brazilo kaj Portugalujo estis oficiale simpligita, kaj de tiam la portugallingvaj popoloj havas laŭleĝe devigan ortografion multe pli similan al Esperanto ol al la malnova. Ĝi estas duonfonetika, regula, facile lernebla.

Eble oni mokos min, se mi kuraĝos diri, ke tiun grandan paŝon ni ŝuldas al Esperanto, sed neniu rajtas nei la tridekjaran, publikan bataladon de l' eminenta esperantisto, al kiu Esperanto ŝuldas la laŭleĝan deklaron «klara lingvo por telegrafa uzado», de la jaro 1906a.

Ismael Gomes Braga, Rio de Janeiro, Brazilo.



Nia Misio

« La lingvo internacia kaj ĝia interna ideo ne estas du aferoj apartaj, el kiuj oni povas, laŭ sia plaĉo, unu kaŝi en tirkeston kaj montri al la homoj nur la alian. Ili formas unu vivantan tuton, kies korpo estas la lingvo, kaj animo — la spirito. Se oni volus disigi la korpon de la animo, restus nenio, krom putranta kadavro. Se en lokomotivo ni estingos la fajron, kiamaniere ĝi iru antaŭen, eĉ kun akvo-plena kaldrono, eĉ sur perfektaj reloj?

Batalante por Esperanto ni ne penu kaŝi kaj sufoki ĝian movodonan fajron — la ideon. Ni devas kulturi ĝin, ne ignori. Ni devas apostoli tra la mondo ne nur la

lingvon Esperanto, sed ankaŭ tion, por kio ĝi estis kreita — la interpopolan interproksimiĝon kaj simpation. Kaj ni neniel laciĝu aŭ senkuraĝiĝu en tiu batalo, ĉar ĝi estas por ni batalo pri vivo aŭ morto

. Se Esperanto venus en la mondon en iu benita epoko de universala paco, ĝi estus nur lingvo. Sed Esperanto enpaŝis la mondarenon en la tempo, kiam tiu areno similas al la sangaj arenoj de la antikvaj romanoj. Tio montras, ke laŭ la volo de la destino, Esperanto, aperinta antaŭ la mondo en la nuna epoko, havas mision, kiun ĝi devas plenumi. Tiu misio estas — akceli la Universalan Pacon.

De tiu misio ni ne forkliniĝu. Ni laboru ne nur, por disvastigi la internacian vortaron kaj internacian gramatikon. Ni laboru, kuraĝe kaj malkaŝe, por ke dank' al la lingvo internacia pli bonaj rilatoj ekregu inter la infanoj de la homaro.»

El artikolo de Lidja ZAMENHOF,
en «Esperanto», dec. 34



Esperanto aŭ la angla lingvo?

Kutime pledas por la akcepto de la angla lingvo kiel estonta lingvo internacia tiuj personoj, kiuj mem scipovas ĝin kaj pro tio esperas gajni el ĝia alprenado aŭ almenaŭ ne riskas perdi.

Kial mi do subtenas Esperanton kaj ne proponas mian gepatran kiel solvon?

Oni ne forgesu, ke bezonata estas lingvo ne sole por homoj kleraj kaj edukitaj, sed lingvo por kiu ajn homo kaj por kia ajn celo. La elektota lingvo devos esti treege simpla kaj taŭga por ordinaraj senkapabluloj. La solvo postulas lingvon: 1) tre simplan regulan, 2) sufiĉe logikan, sed flekseblan sen idiotismoj, 3) plene esprimopovan. Tiujn kondiĉojn la angla ne plenumas. Ĝiaj vortoj havas tiom da kontraŭaj signifoj, ĝia ortografio kaj elparolo estas tiom ĥaosaj, ke tio turmentas dum tuta vivo la anglojn mem. Lingvo tiel kompli-

kita restas komprenebla nur, se oni tre lerte traktas ĝin. Male, Esperanto, kies klare difinitaj vortoj kaj logika fundamento donas idealan bazon por internacia lingvo.

Ĉiuj provoj simpligi la anglan ortografion por fari la lingvon pli taŭga plene malsukcesis, kaj la pretendoj de Basic English montriĝis ridindaj kaj absurdaj. 850 vortoj sufiĉas laŭ ties aŭtoro por modernaj bezonoj! Mankas eĉ tre oftaj vortoj, kaj ne eblas, ke oni devas diri «an animal that says hee-haw!» (Besto, kiu diras *ion*; io = imito de azenbleko).

Per Esperanta vortfara sistemo eĉ komencanto, kiu lernis nur dum kelkaj semajnoj, povas el 500 radikoj fari 2-3000 vortojn!

Multfoje mi uzis la anglan lingvon kun svedoj kaj danoj, kiujn mi povis bone kompreni, ĉar la plej multaj el ili eldiris unudu vortojn ĉiun duan minuton! Ĉu ili komprenis min? Post peniga ripetado ofte ekzistis miskompreno. Jen ekzemplo: Pasintan Aŭguston mi veturis per vagonaro tra Danujo al Stokholmo. Antaŭmendinte 42 manĝojn antaŭ ol surŝipiĝi en Helsingor oni fine trovis 24 pretiĝitajn, kvankam la mendo estis malrapide ripetata por eviti eraron!

Sed ĉu la politikistoj kaj diplomatoj mem (certe pli lertaj ol la plej mallertaj) fidus al la angla pro sia majstreco de tiu lingvo? Se jes, kion faras la ĉieaj interpretistoj, kiuj dediĉas multajn jarojn al la lernado de lingvoj, ekzemple dum konferencoj kaj en la Palaco de Ligo de Nacioj, Ĝenevo?

Fine la skribinto uzis Esperanton pli ol dek jarojn kaj parolis kun homoj de almenaŭ 15 diversaj lingvoj kun plena facileco — kaj lernis la lingvon dum kvar monatoj per korespondo!

La homoj fieras, ke la posedo de lingvo levas ilin alten super la bestoj. Kiom alte tamen ili staras, se pro la multeco kaj konfuziĝoj de lingvoj ili ne povas kompreni unu la alian!!

Ivan K. Pope, Anglujo
el «Dansk Esp-Blad», jan. 35



Pri Lernado de la Franca

Arnold Bennett, fama angla romanisto, iam konfesis al la Londona «Evening Standard», kiel malfacila li trovis la la francan lingvon. Tial ĉar li estas mondkonate alt-intelekta kaj havas ĉian oportunecon por sekvi la studadon, lia artikolo estas efektive gravsignifa. Post tio, ke dum 25 jaroj li penadis posedi la lingvon kaj jam akiris reputacion kiel fakulo en la franca literaturo, li devis konstati, ke partopreni konversacion en Francujo estis por li neeble.

«Li parolas france sambone kiel franco». Ofte ni aŭdas tiun frazon, kiu cetere preskaŭ ĉiuokaze estas malvera. Pri la buŝuzado de la franca fare de nefrancoj oni eldiras pli da fantaziaj mensogoj, ol pri la grandoj de kaptitaj fiŝoj. Jen mia senornama rakonto: Mi eklernis la francan en la aĝo de naŭ jaroj. Kiam mi estis 22-jara, mi entreprenis esplori la pli vastan kampon de la nuntempa franca literaturo. Post ne longe strato Fleet (la centro de la Londonaj ĵurnalistoj) rigardis min kiel, almenaŭ ĝis modesta grado, sufiĉe fidindan aŭtoritatulon pri la franca literaturo. En mia 35-a jaro mi iris por loĝi, kiel solulo, en Parizo, kaj mi trovis, ke mi povis nek kompreni la ĉiutagan francan lingvaĵon, nek komprenigi min per la sama. Jam tiam pli ol jarcentkvaronon mi studadis la francan kaj skribadis pli ol dek jarojn pri ĝia literaturo».

Similan ĉagrenon jam sentis miloj da tiuj, kiuj penis lerni la francan.

Post sia supra konstato s-ro Bennett prenis tion, kio ŝajnis al li la necesaj paŝoj, por ke li fariĝu fluparola. Sed li ankoraŭ spertis esperfrakasigon:

«La nombro de pursangaj angloj povantaj 'paroli france sambone kiel franco' estas tiel eta, ke ĝin ni devas rigardi preskaŭ nekonsiderinda. Mi mem neniam renkontis eĉ unu. Mi memoras, ke foje kiam, atin-

ginte teruran fluecon en la idiotismoriĉa stratula francaĵo, kaj povante instrui ilialingvan slangon al francoj, unu el tiuj ĉi diris al mi: 'Kion ajn alian vi eventuale perdos, ne perdu vian anglan akcenton. Ĝi estas adorinda'. Kia bato! Sed ĝis la nuna tago, mi devas diri, ke malofte mi legas paĝon de franca teksto sen ek trovi frazon de mi nekomprenatan, aŭ vidi teatraĵon sen perdi liniojn pro nekompleta posedo de la lingvo».

Estas trafe por ĉi temo, kompari la spertojn de s-ro B. kun tiuj de Esperantolernanto dotita per tre ordinaraj talentoj. Unuapunkte, estas kompreneble, ke tiu ĉi ne povas vivi inter homoj senescepte parolantaj la artlingvon. Tamen, li povas posedi la gramatikon kaj sintakson en de tri ĝis naŭ monatoj; je la fino de naŭ monatoj li havas vortprovizon sufiĉan por ĉiu celo de la ĉiutaga vivo, por vojaĝo kaj legado. Je la fino de ses monatoj li parolas la lingvon, eble kun iom da balbuto, tamen sufiĉe klare por evidentigi siajn bezonojn en ĉiu loko. Flueco en konversacio povas postuli de unu ĝis du jarojn, laŭ la grado de propra lango-fleksebleco kaj oportunoj por sinekzerco. Post jara studo, kiu devus enhavi multe da legado, estus eksterordinare se li trovus frazon, krom en malfacila poezio, kiun li ne unuavide komprenus. Komparu tion ĉi kun la studo de la franca (aŭ por la neanglo, angla, kiu kiom koncernas prononcon kaj idiotismojn, estas eĉ pli malfacila ol la franca), kaj tuj falos en la okulojn la malpraktikeco, propagandi la pretendojn de nacia lingvo kiel internacia helplingvo.

El la angla tradukis

R. Banham, Melburno, Aŭstralio.

Vi havas bonan ideon? Ne konservu, sed publikigu ĝin en niaj paĝoj!

OOMOTO INTERNACIA

Orienta Filozofio

(5)

— Jamato Masaharu —

La Ĉina Spirito

En la ĝisnunaj ĉapitroj ni esploris ĝenerale la komunan bazon de l' Orienta mondkompreno, kiun ni nomis Orienta Filozofio. Denun ni ekzamenos la specialajn aspektojn de l' Orienta mondrigardo laŭvice tra ĉinaj, hindaj kaj japanaj okuloj. Hodiaŭ ni pritraktos do la ĉinan spiriton.

Estas priplorinde, ke en okcidentaj lernejoj oni obstine prisilentas Ĉinujojn. Tial ne estas mirinde, ke la blankaj homoj nenion scias pri la antikvega ĉina kulturo, jam ne parolante pri la nuna stato de la vastega landaro, kiun oni eble malprave nomas per la sola vorto: Ĉinujo.

La ĉina antikveco etendiĝas de la plej nebulaj jaroj de l' pasinto ĝis la tagoj de Konfucio, kiu estis kvazaŭ Jesuo por la ĉinoj. Pozitivismo, t. e. praktikemo karakterizas la antikvan pensadon ĉinan. Dank' al la komplikita sed mirinde evoluinta ĉina skribado (ideografia sistemo) la 300 milionoj da loĝantoj povis libere interkompreniĝi almenaŭ skribe — almenaŭ tiuj, kiuj sciis skribi, nature, sed tiaj «interpretistoj» troviĝis ĉie tra la lando. La florepoko de l' ĉina kulturo okazis longe antaŭ Konfucio kaj la vasta lando jam tiam estis tre dense loĝata, preskaŭ same kiel hodiaŭ. Post Konfucio la spirita progreso de Ĉinujo ŝajnas halti kaj ĝis niaj tagoj la historio de la lando estas kvazaŭ serio da sangaj interbataloj de generaloj, banditoj, politikistoj kaj profiteuloj.

Se Konfucio estas nomebla Kristo de Ĉinujo, Lao-ĉe estas eble kvazaŭ Luther. La unua estis multe pli progresema ol la dua. Ili ambaŭ klopodis savi la ĉinan kulturon, reunigi ĝin, sed kvankam ili estas ĝenerale admirataj, iliaj instruoj ne estas ĝenerale sekvataj, same kiel tio okazas en

la Kristana mezepoko de Eŭropo kiam oni mortigadis judojn en la nomo de Jesuo Kristo.

Konfucio kaj Lao-ĉe

Konfucio estas jam bone konata ne nur en la tutmonda sed eĉ en la materialisma Esperanta literaturo; Lao-ĉe estas malpli konata — kvankam «Oomoto Internacia» jam publikigis artikolserion pri lia filozofio.

Estas sencele studi Konfuciismon kaj Lao-ĉe-ismon aparte. Oni povas nomi ambaŭ filozofiojn *Taoismo* kaj studi ĝin kune, nezorgante ĉu la aŭtoro de tiu aŭ alia maksimumo estis Konfucio, Lao-ĉe aŭ eble alia, fama disĉiplo.

Se la moto de l' Okcidento estas: «Scio kondukas al Potenco», tiu de l' *Taoismo* estas: «Scio estas plej granda danĝero». En *Taoismo* oni kredas la fundamentan bonecon de l' homo kaj timas la venenigan haladzon de ĉiu civilizo. Jen estas la kaŭzo kiu klarigas, ke Ĉinujo restis sen civilizo malgraŭ sia alta kulturo.

Kio estas *Tao*? Laŭ Lao-ĉe *Tao* estas Naturo (= *Taikyoku*). Estas komuna kredo meze de *taoistoj*, ke simpla kamparano pli facile komprenas *Taon* ol saĝulo. Pacieneco karakterizas la ĉinan animon pli ol oni kredus vidante la nunan staton de la lando. Tiu instruoj pri la facileco de l' savo por simpluloj kiu estas la bazo de *Taoismo* ege similas cetere la instruon de Jesuo pri la Ĉielregno kaj la Savo al ĉiuj homoj. Kaj se ekzistas simileco, ni povas esti certaj, ke Kristanismo, almenaŭ parte, originas el Ĉinujo... kiel multegaj aliaj aferoj en la mondo.

Filozofio de l' Vivo

— Hidemaru DEGUĈI —

Senfina Limo

ĈIO konsistas en *alternado de horizontala kaj vertikala ĉenoj**. La horizontala ĉeno, kiel la vorto montras, estas sinsekva disvolviĝo sur la horizontala ebena, kaj la vertikala ĉeno estas sinsekva rilato inter pli kaj pli superaj gradoj de disvolviĝo, kia estas ekz. inter la unua, dua, tria... klasoj de lernejo. Tiuj ĉi klasoj estas tute malidentaj kvankam interĉenigitaj unu sur la alia. Tia ĉeniĝo troviĝas ankaŭ en la rilato inter densaj folioj de ajlo!** La ambaŭ ĉenoj (horizontala kaj vertikala) estas komunaj je *kunligececo*, tamen estas *esence* malsamaj. La transira limo de la unua klaso al la dua estas tre mallonga, sed kiam iu fariĝas dua-klasano, li tuj fariĝas tute malsama kun unua-klasano je rango kaj cirkonstancoj.

Ĝuste per tia vertikala ĉeno, la postmorta vivo estas interkunligata kun la surtera. La transira limo de nia mondo en alian estas nur momenta, tamen kiam oni eniras en la alian mondon, oni devas subite demeti la vestaĵon de la materia mondo. Ankaŭ en okazo de la supre-dirita ajlo estas same; inter supra kaj malsupra folioj ekzistas preskaŭ neniom da spaco, sed ili formas, por tiel diri, apartajn mondojn.

Kiel mi jam klarigis, la horizontala ĉeno estas sinsekva kunligiteco sur la sama horizontala ebena, tial ĉio sur ĝi havas pli-malpli da komuneco, sekve, estas pli facile sentebla kaj komprenebla, ol en vertikala rilato. Tamen, en la vertikala okazo, unu gradon pli alta klaso (aŭ regiono) formas tute aliecan mondon, tial sen eniri en tiun mondon, oni ne povas ĝin perfekte koni de malsupre. Ĝuste en tia rilato

troviĝas la fizika kaj spirita mondoj. Parolante pri la spirita mondo, ankaŭ ĝi konsistas el vertikale interligitaj regionoj unu sur aliaj, senfine altaj kaj senfine malaltaj. La materia mondo en kiu ni vivas estas nur la ebena reprezentado de la vertikala Spirit-mondo kiel de l' antikveco oni ĝuste nomas ĝin «speguliĝinta mondo». Kiel la ebena leĝo estas ne-aplikebla al la solida geometrio, tiel per leĝoj de la materia mondo oni ne povas koni la spiritan mondon — tiom pli ne povas, se oni ne scias la *korelativan analogecon* inter la ambaŭ mondoj.

Ankaŭ en la homa menso okazas la vertikala ĉen-fenomeno. Kiam oni mense tratabas unu gradon pli supren, oni subite trovas novan mondon: delonga enigmo solviĝos, suferoj kaj ĉagrenoj plu ne ekzistos tie. La ofte uzata frazo «*atingi perfektan seniluziĝon* aŭ *plenan konvinkiĝon*» esprimas ĝuste tian staton, en kiu oni mense supreniris la vertikalan ĉenon je unu grado post longa sufero kaj aflikto.

Ankoraŭ iom pri la vertikala ĉeno de evoluo. Ekzemple, burĝono — floro — frukto: ili estas tute malsamaj laŭforme, sed ilin kunligas seninterrompa ĉeno vertikala. La transira tempo de burĝono en floron estas relative mallonga, kaj tiu de floro en frukton estas momenta. Ili tri estas en nedisigebleco. Feteco kaj suĉinfaneco — infaneco antaŭ- kaj post-paŝpova — juneco antaŭ- kaj post-amora — matureco antaŭ- kaj post-edziĝa (aŭ-edziniĝa): la transira periodo inter ambaŭ aĝoj estas respektive tre mallonga, sed ekzistas ja grandega diferenco inter ili. Tiamaniere ĉio en la mondo sekvas la vertikalan ĉenon — kunligon senfinan de iu mondo al pli kaj pli superaj mondoj.

* ĉiu kursivigo estas la mia — la trad.,

** *Allium Bakeri*



Sinjoro Hidemaru Degučĉi.

Ŝtupara Progreslinio

Jen estas semo. En la tero ĝi ekĝermos kaj ĝi bezonos iom da tempo por fariĝi planto. Sur la planto ankoraŭ ne floras. Sed post kelkaj jaroj ĝi fariĝos arbo kaj portos florojn.


Jen estas senmova akvamaso. Ankoraŭ ne tuj okazos vario en ĝia staranta stato. La tempo pasos. En ĝi naskiĝos mulĉe da larvoj. Sed estos iom da tempo antaŭ ol ili fariĝos moskitoj. Nur post forpaso de kelka tempo ili fariĝos flugpovaj moskitoj.

Tia *interkrampado* de evoluo okazas al ĉio, kaj en ĉiu interkrampita parto okazas disvolviĝo konstanta sed ne tre klare rimarkebla. Al longa, interna, nevidebla vario venos unugrada transirperiodo de evoluo, pli facile rimarkebla.

En la tero la semo komencas unue internan ĝermadon. Ĝi tamen ankoraŭ ne aperas eksteren. Kiam la semo atingis plenumiĝon de l' interna kresko, ĝi komencas fari eksteran ĝermadon: ĝi nun burĝonos. La samo okazas ankaŭ en metamorfozo de larvoj en moskitojn.

Tio, kion mi rakontis ĉi-supre signifas, ke la laŭ-ŝajne tiel-nomata «subita ekstera aliĝo» efektive estas nenio alia ol fenomeno fininta latentan variadon. En la mondo ne ekzistas eksplodo, nek subito en la vera senco de l' vortoj.

La disvolviĝo de la semo antaŭ ĝia ekstera ĝermado, kaj tiu de la larveto antaŭ ol fariĝi moskito, estas la evoluo *inter la kadro de semo aŭ de larvo*. Tian mi nomas *horizontala progreso*. Larvo aliformiĝas en moskiton kaj semo en planton. Tian altiran evoluon mi nomas *vertikala progreso*. Ĉio en la mondo evoluas per alterno de l' horizontala kaj vertikala progresoj. Tion ambaŭ-kune mi nomas *ŝtupara progreslinio de evoluo*.



Anima purigado

Kiel neevitebla procezo de l' anima purigado, ni devas vole-nevole revivi la *faksimilon* de l' antaŭa vivo: per la nuna vivo ripeti ĉion, kion ni faris en la antaŭa vivo, aŭ bonan aŭ malbonan.

Sen profunda kredo, absorbiteco kaj pacienco dum tiu periodo, oni devas longan tempon vagi en ĉiam sama sfero, kaj kun maldiligenteco kaj malesperemo oni devas pli kaj pli enfali en pli malalt-sferan mondon.

Se oni kredos Dion konstante kaj stabile, oni certe ricevos favoron de Dio. Tial en la tempo dum kiam ni vivas pentofaran *faksimilon* de l' antaŭa vivo, ni estu toleremaj, indulgemaj kaj pardonu unu la aliajn esperante ke ni rapide kaj frue finu pentofaran vivon per kiel eble plej malgranda kaj mallonga *faksimilo*, por ke ni eniru en novan, pli belan fazon de la vivo. Dum oni konstante enmiksas sin en aferojn de

aliaj per grumblado, ke tia ago estas puninda aŭ tia konduto estas nepardoninda, oni ne povas ankoraŭ atingi la golon de l' vera kredo kaj mondpercepto.

E t e r n e c o

Estas multe pli bone kuraĝe kaj simplanime plenumi kion vi volas, ol heziti pro fiaskotimo. Spirito estas senforma: ĝi tamen volas kaj penegas iel formiĝi. Doni al ĝi formon apartenas al la tasko de l' homoj. Eĉ eta sento apenaŭ konsciebla estas atentinda, ĉar se oni lasos ĝin, ĝi restos ĉiam senforme kaj «*abortos*». La aborto de sentoj kaj ideoj ofte okazas.

Tial ni ĉiam agu aktive, ĉar la *spirĵtfluo*, konscie aŭ senkonscie entenata en nia interno, elfluos eksteren, konkretiĝos, enformiĝos kaj realiĝos seninterrompe. En tiu okazo la *spirĵtkurento* ne stagnos, sed konstante renoviĝos tiel vigle, ke oni povas ĉiam vivi kun freŝa sento kaj gaja koro. Sed ĉiu homo havas *pekomaĵulon* sur la animo, kaj kun pekoporta animo la homo emas resti inerte malgraŭ energia vipado de l' intelekto kaj intertempe ne ĉesas interna konflikto elkovanta abundon da ĉagreniĝoj. El la supra konstato ni povas konkludi, ke la homo, *antaŭ ol li revenas al sia pura animo*, ne povas libere plenumi la taskon donitan de Dio. Dum la animo restas malpura, la vivo estas teda, senkonsola, vualita kaj plena de afliktoj. Nur per longa suferiga penado de l' ambaŭ interna kaj karna koroj oni povas reveni al sia pura animo. Dio donis al ĉiu homo *Naohi**. Oni devas introspekti al ĝi kaj decide antaŭenmarŝi distingante bonon de malbono en ĉiuj cirkonstancoj. Per granda animo oni komprenu ĉion bonintence, ke ĉio estas aranĝata de Dia Volo kaj dankeme, plezure oni faru la ĉiumomentan plej-bonon.

Ĉiu homo estas dotita de propra misio.

Sekve, kiam li vologas ion fari, li plenumu tion senhezite laŭ sia volo, kaj tiusence li ne malhelpu aliulon plenumi sian aferon. En okazo kiam li ekrimarkis ke li eraris, li tuj revenu al ĝusta direkto. Ne haltu longan tempon melankolie ĉe farita eraro: vi tute ne bezonas vin enkarcerigi en *malliberejo* de vi proprefarita.

El la vidpunkto de la spirita mondo, ĉio estas nur *farata*, kaj la homo estas *fariĝata*. La konceptomaniero, ke la homo ion faras aŭ plenumas *per si mem*, devenas de l' supraĵa observo nur al ekstero kaj ŝajno. La postuloj en la interno de l' homo estas spontanaj per la *internofluo* el la spirita mondo. La homo estas nenio alia ol *viva ricevilo* de l' internofluo. Ne komprenante tion bone, la homo ne povas plenumi la *spirĵtan karieron* de la vivo. La spirita kariero signifas veran vivmanieron per kiu la homo vivante en la fizika mondo komprenas ĉion de interne t. e. spirite. Neni-el povas ekzisti io «*hazarda*». Ĉiuj aferoj okazantaj ĉirkaŭ vi en ĉiu momento, estas nenio alia, ol sugestioj de la spirita mondo. Oni *subite* ekpensas, *hazarde* eltrovas, *akcidente* perdas ion — ĉio ĉi okazas en efektiveco ne subite, nek hazarde, nek akcidente, sed *naturkonsekvence* el la spirita vidpunkto, laŭ la leĝo de l' «*kaŭzo kaj rezulto*», tamen, bedaŭrinde, la homoj ne povas vidi facile la kaŝitan malantaŭon de l' rezulto kaj supraĵe difinas la rezulton «*hazarda*».

Ke oni subite eksentas (aŭ ekpensas) ion — tio estas, por tiel diri, oni ekaŭdis telefon-sonoron el la spirita mondo. Tial respondante al ĝi per sia plej-eblo, oni agas plej fidele al la spirita mondo. Ankaŭ en tiu ĉi senco oni intermetu sin en aferojn de la alia *nur minimume*. Se la homo agas vaste kaj spertas abunde, tiom pli vastan kaj varian mondon li proprumas al si. Ne kateniĝu, nek alteniĝu, sed ĉasu spertojn kun libera granda koro, kaj enmanigu pli grandan mondon. Tiam ĉio en la

* konscienco en pura senco.

universo apartenos al vi! Kompatindaj estas tiaj, kiuj vivas malvastan vivon kun malgranda kaj maltrankvila animo en la kadro de la ŝirm-kovrita «etika racio»: ili neniam vivos la tagon, en kiu ili povos rigardi grandioze majstran panoramon super ilia malgranda «ebur-turo». Ili estas kvazaŭ putranĝoj ripozantaj gravmiene, kaj memestime.

Nian mondon ni povas kulturi kiom ajn vaste laŭ nia animeco. Ŝtonkapuloj, kiuj obstinas en la fiksita «teorio pri bono kaj malbono», por eterne restos sen kulturi pli vastan kaj altan kampon de la vivo. Nek bono absoluta, nek malbono absoluta ekzistas en la mondo. *En ĉiu malbono estas iom da bono kaj inverse.* Ĉio dependas de l' vidpunktoj. Se oni iras orienten, oni perdas okcidenton kaj renverse. Por tute ne perdi ambaŭ partojn, orienton kaj okcidenton, oni devus por eterne stari senmove. Nek ekzistas en la mondo *fiksita tempo kaj spaco*. En la materia mondo tio ekzistas nur kiel simbolo. Nenio estas pli stulta, ol kroĉiĝi je ĝi rigardante ĝin kiel tutan kondiĉon de la mondo. *Kroĉiĝo** estas stagnado kaj putriĝo. Deskuu la balaston de malnova idearo kaj ornamu la frunton per la bela aŭreolo de l' Eterneco! Nur per orientado de nia koro ŝanĝiĝos mondkomprenoj!

Ekspektemo**


Nenio estas pli malcerta ol la «ekspekto». Ne konfidindan «ekspekton» oni ofte celas kaj maltrafas. Maltrafinte oni ĵetiĝas en konfuzon kaj aflikton per *inerteca forto* de l' intensa ekspektemo. Mi opinias, ke ĝojo kaj malĝojo, plezuro kaj sufero en la homa mondo estas *moderigeblaj per preta decideco* de nia koro. Sed la homo laŭnature estas tre memama kaj malfacile preta je decideco senegoisma. Li tro atendas kaj esperas nur plenumiĝon de siaj egoismaj deziro kaj profito. Se kun perfekte grand-

anima decide oni alfrontus donitan cirkonstancan, oni ne bezonus subite paliĝi, nek malesperiĝi kiel ajn la afero irus.

Grandanima, perfekta decide estas indiferenta pri sukceso aŭ fiasko survoja, pri egoisma oportuneco aŭ profito, sed ĝi metas la homon sur la eternan vojon, sur kiu li povas teni eternan mondkomprenon, ekz. eĉ pri fiasko li povas kompreni, ke ankaŭ ĝi estas necesa procezo por supreniri al eterna sukceso kaj akiri gloran venkon de la eterna vivo. La ordinaruloj tro zorgemas, kroĉiĝas je malgranda bagatelo kaj tio estas la naturo de l' homoj, sed jen, pro tio, ili ĉagreniĝas kaj afliktiĝas. Por liberiĝi sin de tio, ili devas nepre koni ĝisfunde pri *sia eterneco kaj senfineco*. Per la koncepto de l' eterneco kaj senfineco ili devas rigardi ĉion en la mondo. Tio estas: malsukceso aŭ malperfekteco estas ne ĉagrenindaj, ĉar ankaŭ tio estas transira procezo por atingi je «*si*» de eterna beleco kaj boneco. En grandanima kompreno pri eterneco (kiun oni nepre devas posedi) eĉ malsukceso aŭ malperfekteco estas beninda kaj dankinda. Se oni tiamaniere, el eterna kaj senlima altvidpunkto, rigardos «*sin*» de la nuna estanteo kaj sian medion, ĉio estos plezuriga, dankinda kaj fonto de feliĉo.*

Trad: T. Nakamura.

* Noto de l' Trad.: Oni komparu la konsilon de SPINOZA, «Rigardu ĉion sub aspekto de l' Eterneco».



Desegnaĵo de S-ro Hidemaru Deguĉi

* malrezignacio: redeziro al io perdita, aŭ avareco, ambicio k. s.

** Fulcher-Long ktp.: esper-atendemo.

La Ĉapelo Mortas

— *Korstolányi Dezső* —

ESTI havis ankaŭ nigran kraniĉapelon, tiaspecan ferĉapelon, kiu mordas la ĝin bantanton.

Ĉi tion li kutimis tiam surmeti, kiam li ekiris je obskuraj, antaŭ-urbaj aventuroj kaj ne volis, ke oni ekkonu lin. Ĝia larĝa, severa rando ektiris liajn trajtojn en unuaĵon kaj igis lian profilon malmola.

Ankaŭ en ia venta, griza vintromateno li portis tiun ĉi ferĉapelon.

Kiam li ĉe la stratangulo klopodis iri al la aliflanka trotuaro, la vento forblovis ĝin de sur lia kapo tuj antaŭ liajn piedojn. Li kliniĝis por ĝi. Tiam la vento suprenlevis ĝin alten kaj klakade terenĵetis dekstren, poste maldekstren. Senspire li postkuris. La ĉapelo ekruliĝis, dum ventoŝtormo tordiĝis ĝis la mezo de la veturilvojo. Tie ĝi haltis.

Li sekvis la ĉapelon malrapide, oportune. Sed kiam li atingis la stratomezon kaj faris movon por levi ĝin, furioze trumpe-tanta aŭtomobilo alproksimiĝis sovaĝ-rapidege. Nur tiom da tempo por li restis, ke li flanken saltu.

La trotuarpaŝantoj kriadis.

Pereis, li pereis.

Ĉu ĝi radpremis la ĉapelon?

Jes, jes, oni diris kaj ridis.

ESTI, kiu aŭdis la konfunzan bruon, ektimiĝinte palpatis sin kaj kiam li konstatis, ke li estas sendifekta, rerapidis sur la trotuaron, al tiu scivolema, gapa grupo kiu dum momento formiĝas je tempo de mortaj radpremoj.

La homoj ridetis, fingre montradis al iu punkto.

Oni akceptis lin kun honoro, intereso. Kiam oni alrigardis lin, sur la vizaĝoj ĉesis rideto, ekaperis ia kondolenco. Ja fine la ĉapelo estis lia kunulo kaj li perdis ĝin.

Nur nun li komprenis, kio okazis.

La ĉapelo kuŝaĉis sur la mezo de la veturilvojo. La aŭtomobilradoj transruliĝis sur ĝi, terure displatigis, kvazaŭ kalandris ĝin, kiel tian nigran hundeton, kiun la aŭtomobiloj mortpuŝas en la stratopolvo. Nur malhela makulo vidiĝis.

Li atendis ĝis kiam la kolono de la veturiloj maldensiĝas kaj dum ia batalpaŭzo de la trafiko, li aliris ĝin.

Eble ĝi vivas ankoraŭ, li pensis.

Sed ĝi jam ne vivis. La ĉapelo tuj mortis. Ĝi estis absolute plata, senviva kaj senanima. Li rememoris, ke ĝi ankaŭ krakis. Tiam povis esti forfluganta ĝia animo.

Ĝia rando malsupren kliniĝaĉis; ĝia ŝvitledo, substofa elpendaĉis. Ĝi suferis gravajn internajn difektojn.

Dum iom da tempo li staradis antaŭ ĝi nudkape, kvazaŭ antaŭ iu mortinto.

Poste li enpaŝis la vid-al-vidan ĉapelvendejon kun tia facilanimeco, kun kiu ni reindiferentiĝas pri etaj kaj egaj tragedioj, li aĉetis por si brunan leporharĉapelon.

Kiam li elvenis, la sentombigita kadavro de sia ĉapelo ĉiam ankoraŭ kuŝis tie, jam ne plu en la centro de la interesiĝo, sed ĉirkaŭita per subita indiferento kaj forgeso. Aŭtomobiloj zigzagis ĉirkaŭ kaj sur ĝi.

Kun la nova ĉapelo sur la kapo, kiu kvazaŭ akuzis lin pri malfideleco, li medietadis.

La ĉapelo estas verdire la plej nobla vestaĵpeco. Ĝi kovras nian kranion, laŭ sia konvekso formo ĝi imitas nian kranion, ĝi estas kvazaŭ aldonkranio, kiun la fumo-flamo de nia cerbo plenigas je enhavo. Tiu ĉi ĉapelo servis lin dum du jaroj je plej diversaj okazoj, je rendevuoj kaj ankaŭ je enterigoj. Ĉiu vespere, dum li amuziĝis en la spektatorejo, ĝi atendadis lin en la teatra deponejo tra pluraj horoj

kun pacienca rezigno kaj neniam ĝi eĉ ekpensis pri fuĝo.

Lia koro künpremiĝis.

Denove li ekmalfermis en la ĉapelvendejon.

• Mi petas nigran rubandon, li diris.

• Ĝi ne akordiĝas sur tiun ĉi — klarigis la komizo kaj ekrigardis al li. Aŭ ĉu vi bonvolas funebri iun?

Jes, respondis ESTI decide.

Ekstere li eklevis sian funebrokrepan ĉapelon antaŭ sia frue kaj tragike mortinta ĉapelo.

Dum ses semajnoj li funebriis ĝin, kiel oni kutimas tian malproksiman parencon.

El la hungara tradukis

K. I. Károly

El la Batalfronto de l' Fundamentanoj

Ĉi sube ni publikigas cirkuleron adresitan de nia amiko Henriko Fischer L.K. al la Lingvo-Komitatoj en kiu li elokvente refutas la necesecon enkonduki balaston da nenecesaj novaj vortoj en nian lingvon. Ŝajnas, ke lastatempe la Lingva Komitato kiu devus esti la bastiongardanto de la Fundamento, frivole koketas kun la tombofosantoj de la *Internacia Lingvo*. Ni do varme aprobas la kuraĝan sintenon de nia rumana amiko kaj ne dubas, ke liaj sanaj konsiloj trovos finfine simpatian akcepton ĉe niaj «oficialuloj». En mala okazo la Esperantistaro scios ilin forpeli kaj elekti fidelajn virojn al la noblaj idealoj de nia Majstro Zamenhof. La RED.



Kara kolego! Vi certe aprobas la alvokon de s-no Orengo rilate la 25 novajn radikojn oficialigotajn kaj siajn argumentojn. Do nepre rifuzu voĉdoni pli ol jenaj ses el la listo sendita de la Akademio la 19 an de Februaro:

honorario, vizio, arbusto, susuri, angoro kaj baledo ne baleto.

Nepre rifuzu jenajn ok malbonajn: aŭguri, bankiero, iniciativo, iniciatoro, konduktoro, renomo, reteno, vivisekcio.

Rifuzu ankaŭ la dekunu **tute nenecesajn** aliajn, senutila balasto malfaciliganta la ellernadon de Esperanto: aperturo, apombo, aŭreolo, koncesio, monotona, strebi, ŝrumpi, gramofono, grego, ingredienco kaj vinkto.

Ne forgesu ke ni volas havi **internacian**, ne **eŭropan** lingvon, ne lingvon por **scienculoj** sed facilan lingvon por la **plimulto** de la homaro.

Ne forgesu ke la **duono** de la **Eŭropanoj** nekleraj ne komprenas latinajn kaj germanajn radikojn, ke la **duono** de la **homaro**, la **Azianoj** ne trovas en ilia lingvo eĉ **unu** el niaj radikoj kaj ke ĉiu denove enigita estas **plua** malfacileco.

Teknikaj vortoj en la **teknikajn** vortarojn!

Uzu la geniajn eblecojn de la **vortformado** kreitaj de nia Majstro.

Lernu bone la **unuajn** radikojn, **atentu** ilian sencon kaj vi povas **ciun** vian penson esprimi.

Legu kion verkis nia Majstro pere de tiu lingvo kiun vi volas **nepre fuŝe fliki**.

Ĉiu nenecesa radiko estas **baro** kontraŭ nia sukceso.

Mi parolas dek lingvojn, mi estas filologo kaj mi ankaŭ facile povus eltrovi novajn vortojn kaj **harfendigajn** nuancojn, sed mi antaŭvidas ke se ni daŭrigos la **fabrikadon** **poĝrandan** de novaj radikoj ni bezonos baldaŭ novan lingvon, ne **internacian**, sed — ho ve! — **inter-esperantistan**.

Forigu la **dangeron** kaj rifuzu la **oficialigon** proponitan.

Laboru por la **disvastigo** de Esperanto, por ĝia **aplikado** en la ĉiutaga vivo kaj lasu kreski ĝin:

nature kaj sane: per si mem.

Henriko Fischer L.K.

JAPANUJO

(EL «VOJAĜLIBRO» DE FILOZOFO) (8)

— Grafo H. Keyserling —

KIOTO (4)

MI jam pasigis multajn noktojn en japanaj gastejoj kaj te-domoj, kaj multajn freŝajn matenojn mi vekigis en iliaj malaltaj ĉambroj, sternitaj de matoj. La nokta Japanujo estas plena de la plej intima ĉarmo. La ekstera aspekto de l' stratoj ne povas esti komparata al tiu de la ĉinaj; ili estas monotonaj, malhelaj kaj trankvilaj, kaj la okulo nur malofte estas altirata, kiel en Ĉinujo, de pitoreskaj kaj popularaj scenoj. La nokta vivo de Japanujo pulsas for de l' stratoj. Tie, malantaŭ papermuroj, perceptebla el ekstere kiel ombroludo, gaje, de l' horo de l' krepusko ĝis la malfrua mateno, ĉiunokte, la sono de liutoj kaj la gaja rido de l' knabinoj eĥas eksteren, en la stratojn.

Kiel atmosferplenaj estis tiuj noktoj en la kamparaj gastejoj, kie mi malofte sukcesis ŝteli horon de seninterrompa dormo, ĉar la grupoj de pilgrimantoj malsupre kaj apude neniam laciĝis babilante kaj ridante! Kiel plenaj de atmosfero estis tiuj malfruaj horoj en la urbo, kie mi serĉis malstreĉiĝon post la penoj de l' tago en neordinaraj lokoj, aŭskultante la ĉirpajn kantojn de l' geĵoj aŭ rigardante la artajn mimikojn de gaje pentritaj knabinoj! Kiel atmosferplenaj estis tie ĉi ĝuste tiuj aferoj kiuj tiel multe malhavas tiun kvaliton en Eŭropo! Estas vere, ke Flaubert asertas: *il manque quelque chose à celui qui ne s'est jamais réveillé dans un lit sans nom, qui n'a pas vu dormir sur son oreiller une tête qu'il ne verra plus**; sed li povis nur aludi al tiuj konsternigaj spertoj, kies zenito estas atingita en la *danse macabre***, ĉar en la vivo de eŭropaj publikulinoj la ĉarmo de amindeco mankas kiun vera plezuro posedas. Ili estas malestimataj, ili ŝajnas esti maldolĉiĝintaj se ili

ne estas stultaj bestoj laŭnature; ili estas tro konsciaj, tro antaŭvidemaj por esti vere gajaj, tial ilia gajo ŝajnas esti atakema; kaj ilia amo estas, kiom ajn lertaj ili estu, ĉiam makulita de malvirteco. En Japanujo, malvirteco ŝajnas esti nekonata, eĉ al la lasta virinaĉo. Tie ĉi, ĉiu virino penas esti ĉarma, kaj ĉarmo estas instruata al ili kiel celo en si mem. Kaj ĉar la virinoj ne konsideras malhonorige vendi sin al fremda viro kontraŭ mono, kaj la viro vidas nenion hontindan vizitante tiujn plezur-domojn, atmosfero de sendanĝera gajeco regas en tiuj establoj, same kiel, en Eŭropo, inter infanoj ĉirkaŭ kristnaska arbo.

Estas instruplene observi la eŭropanojn, kiuj vizitas japanan bordelon por la unua fojo. Komence iliaj trajtoj montras tiun malbelan aspekton, kiu aperas sur la vizaĝo de ĉiu homo, kiu ekiras sur la vojo de malvirto; sed tiu esprimo ne daŭras, eĉ sur la vizaĝo de la plej krudaj kaj malafablaj. Ili baldaŭ fariĝas same sendanĝere gajaj kiel la knabinoj, kaj ili baldaŭ perdas konscion pri la fakto, ke laŭ la ideoj de sia propra lando, ili sekvas malbonan vojon. Tie ĉi oni povas sondi la verecon de la onidiro, ke nenio povas malpurigi purulon. Estas nature al japanoj, ke seksaj bezonoj estas kontentigataj, ili vidas nenion malbelan en la seksa ago; la knabinoj, kiuj praktikas la profesion de la nedistinganta amo al sia najbaro, ne opinias tion senhonoriga al si mem. Kaj ĉar ili pensas kaj

* mankas io al tiu, kiu neniam vekigis en lito sen nomo, kiu ne vidis dormi sur sia kuseno kapon, kiun li ne vidos plu. (la Trad.)

** *funebra danco*; danco de mortintoj; dum la Mezepoko oni tiel nomis pentraĵojn reprezentantajn tian dancon, en kiu mortintoj ĉiuagaĵaj kaj ĉiurangaj-infanoj, maljunuloj, reĝoj kaj almozuloj — galopis en infera rondo. Alegorio montranta la fatalecon laŭ kiu ĉiuj homoj egaligas en la morto. (la Trad.)

sentas tiamaniere, ne nur nenio malpura aŭ malbela gluas al ili — sed la vizitanto kunportas reflekton de ilia pureco el la bordelo al sia hejmo. Kiel senfine malaltaj estas niaj tipaj sentoj ĉe tiuj ĉi aferoj kompare al tiuj de Japanoj! Estas, nature, malbono en si mem, ke ekzistas prostituistinoj kaj bezono pri ili. Sed tiu ĉi stato de aferoj neniam estos entute forigebla; konsiderante la konstitucion de l' homa naturo, neniu provo por forigi seksajn interrilatojn ekster geedziĝo sukcesos, kaj ĉiu malbona kondiĉo forigita estos anstataŭigata de nova, kiu estas ofte pli malbona. Ĉu ne estus do pli oportune eviti tiun ĉi malbonon, kiel en Japanujo, forigante ĝian malbonan econ? Mi perfekte scias, ke tio ankaŭ havas malbonajn efikojn, samkiel ĉio en la vivo postlasas ian malbonon. Sed ĉar viroj antaŭ edziĝo neniam vivos ĉaste, kaj ilia poligamia instinkto neniam malaperos, ĉar virinoj daŭre naskiĝos en la mondo, kiuj nur povas esti feliĉaj en la kariero de publikulino: ĉu ne estus pli dezirinde atenti la veran aferstaton per konduto, kiu ne igas ĝin pli malbona ol ĝi jam estas? En Japanujo nenio malhelpas iun virinaĉon reteni puran animon; tial, ŝi ne devas venenigi la viron, kiu ŝin posedas. En Japanujo ekzistas reira vojo al respektinda ekzisto el la domo de plezuro. En Japanujo, la fino de tiuj, kies ekzistebleco ŝajnas dependi de l' freŝeco de sia junaĝo ne estas necese senespera. La profesio de publikulino estas oficiale rekonita. Ĝi estas respektata en sia sfero kiel iu ajn alia profesio. Kiel ĉiu alia, ĝi estas unupartite ekskluziva tutaĵo, aliparte, kiel ĉiu alia, ĝi dependas de metabola asimilo.* Ĝi eĉ havas oficialan devon, kiu donas al ĝi tiun specialan memkonscion, kiun povas malhavi neniu profesio. Mi jam skribis pri la privilegio, kiun posedas la gejšoj, vivteni la animon de Japanujo konservante la tradiciojn pri danco, mimiko kaj ludo. Pli ol unu bordelo ŝajnas esti alprenintaj sendevige similan taskon, kiu estas honorigita

korresponde: en multaj el tiuj ĉi, la plej altaj tradicioj pri stilo kaj kulturo kiuj postrestas, estas konservataj. Unu el tiuj ĉi domoj en Kioto apartenas al la historiaj monumentoj. Ĝi ekzistas de centjaroj, estrata de la originala dinastio. La grandaj viroj de la lando kutimis vizitadi ĝin, por forgesi siajn zorgojn en gaja societo, aŭ alioke por ĉeesti gravajn konfidenciajn kunvenojn sekrete. Valoraj murbildoj de majstroj dekoras la ĉambrojn, ĉiu el kiuj portas nomon simile al tiuj de la reĝa palaco en Anglujo. La plej delikata etiketo regas inter la enloĝantinoj. Nenie estas sinjorinoj pli bone edukitaj, nenie ili portas pli graciajn vestaĵojn aŭ parolas pli elektitan lingvaĵon; ili konservas la tradiciojn de kortega stilo. Kaj tiu ĉi merito estas rekonata de la ŝtato ĉar ili rajtas gvidi la procesion dum la Imperia Novjara Festo.

La japana sinteno al seksaj problemoj estas, en la limoj de miaj observoj ĝis hodiaŭ, ne pli malalta sed pli alta ol la niaj. La ekzistanta realeco ne estas la plej alta enkorpigo de l' idealo sendube—malproksime de tio—sed la idealo kiel tia estas pli alta. En signifo, mi ne konas pli bonan sintenon ol tiu de la japanoj. Kaj, fakte, niaj reformklopodoj moviĝas aŭtomate al la direkto de la japana idealo, ne gravas kiom malmulte niaj pioniroj ŝatos, ke tio estu vera. «Malmoraleco» estas elradikigenda, la provo montras malgrandan sukceson, sed en la procezo io pli bona estas atingata: la falintaj virinoj estas rigardataj per pli afablaj okuloj; ĉio ebla estas farata por plialtigi la memkonscion de l' publikulino; la senespera fataleco, kiu neeviteble atendis needziniĝintajn patrinojn en antaŭaj tagoj, atendas ilin pli kaj pli malofte. Kion ĉi ĉio signifas, se ne tion, ke eĉ la kristana homaro komencas agnoski, ke natura malbono povas esti forigata nur per la forigo de ĝia naturo, tiom, kiom eblas? La falinta knabino, kiu ne hontas pri sia falo, ne devas malsupreniri la ŝtuparon de homaj estaĵoj. Estas pli bone krei mondon en kiu ĉio negativa estas transformata al pozitivaj kvalitoj, ol moralprediki. Ĉiu manifestiĝo povas sign-

* *metabola asimilo*: scienca esprimo, t. n. «internacia» kiu signifas tie ĉi ŝanĝigon per kresko, progreson, specon de evoluo. (La Trad.)

ifi ion pozitivan; nur dependas de ni, ke ni interpretu ĝin tiamaniere. La nova signifo de malnovaj faktoj baldaŭ kreos novajn kaj pli bonajn faktojn el si mem...

* * *

MI reprenas la fadenon de l' hieraŭaj observoj. La ĉino kiu asertis ke la vera kialo pro kiu la eŭropanoj havas idealon pri ĉasteco estas ilia nemezurebla krudeco kompare al la azianoj — ne estis malprava, post ĉio; la eŭropanoj, li asertis, devas havi idealon rekte kontraŭan al ilia vera naturo, dum la pli mildaj, ĝenerale vegetaranaj kaj konsekvence malpli animalcaj enloĝantoj de l' Oriento alprenas pli naturan sintenon sen danĝero. Estas efektive vere: en la Oriento eĉ la nenormala individuo estas apenaŭ tiel brutala* volupta kiel la meza eŭropano; kiel la spirito de l' aĝo ne kreas artefaritajn barojn, la atmosfero de Eŭropo estas erotike provoka laŭ grado kiu frapas ĉiun kiu forestis dum kelka tempo kiel patologia; ne estas tro multe por aserti ke la atmosfero de iu *bal blanc*** en Francujo estas pli malĉasta ol tiu de japana bordelo. Estas nenio en la eŭropanino, de ŝiaj diafanaj ŝtrumpoj al la pureco kaj senkulpeco kiujn ŝi elmontras, kio ne estus kalkulita, laŭ la plej subtila maniero, por provoki la dezirojn de viroj. Ĉiu plua vestaĵo kiun ŝi surmetas agas kiel aldona invito por senigi ŝin de ĝi. Kaj ĉar nia socia kulturo, kion ajn iuj diru, ŝuldas sian specialan karakteron al la rolo kiun ludas virinoj en ĝi, la rezultato estas la akcentigo al la erotiko de l' tuta ekzistado. Neniu supozu, ke tio ĉi estas rezultato de la liberala sinteno rilate al la amaferoj kiu konstante kreskas nuntempe: neado kaj aserto montras psikologie ĉiam la saman aferon; la prudeco de l' puritano signifas ekzakte la samon kiel la cinikismo de l' voluptulo. Tio ĉi pravas tiugrade

* brutala: enregistrita de Wüster: krudega, maldelikata (homo).

** «blanka balo» (franca): en kiu junulinoj kun akompano de patrinoj partoprenas, ofte aranĝata kun bonfara celo («Bal des petits lits blancs,» etc).

ke, kiel mia ĉina amiko rimarkis tute korekte, niaj principoj pri la idealo de l' ĉasteco verdire pruvas nian senliman voluptecon.

Lia plia aserto, ke ni bezonas la idealon pri ĉasteco por kontroli nin mem estas nature nur parte aplikebla simple ĉar nenio pli grandigas la delogan efikon de l' amo ol la antaŭsupozo de ĝia pekeco; tamen lia tezo enhavas pli da vero ol oni povus supozi. Inter francoj, ĉe kiuj la erotika aktiveco renkontas la plej malgrandan psikan reziston, regas pli da honesteco kaj konsekvence pli da pureco en tiu ĉi sfero ol inter germanoj aŭ angloj, kaj ili posedas kulturon de l' volupto kiu ne povas ekzisti tie kie ĝia ekzisto estas intence ignorata; aliparte, la erotika ludas tian rolon inter ili ke oni povas starigi la demandon ĉu iom pli da hipokriteco kaj barbareco ne estas entute malpli damaĝiga ol sinteno al la amo kiu, ĝuste ĉar ĝi ekzakte korespondas al certa naturo, loĝigas pli grandajn obstaklojn sur la vojo de ĝia glorigo. La samo pravas laŭ malpli vasta senco pri katolikaj Germanujo kaj Aŭstrujo. La nordaj ĝermanaj* rasoj estas certe ne malpli voluptemaj ol la ĵus menciitaj; kaj kie ili ŝajnas esti tiaj, tio estas pro la malpli granda grado de diferencigo, ne pro la malforteco de iliaj impulsoj. Sed ĉar, dank' al ilia protestanta heredaĵo konscieco de peko ĝenerale ekzistas kiam ili amas, tiel ke eĉ tiuj kiuj estas malplej ĝenataj de antaŭjuĝoj nur kuraĝas agi tute libere en eksterordinaraj okazoj, ili kondutas pli bone entute ol ili devus laŭ sia naturo, kaj ili efektive fariĝas pli bonaj finfine ĉar edukado ŝanĝas ilian inklinon. Brutaleco estas transformata en tension. Tiugrade estus sendube bone por ni kredi la pekecon de l' kunloĝado.

Estas nenio pli bona ilustro por la fizika kaj spirita blindeco kiu karakterizas la plejparton de l' vojaĝantoj ol la vidpunkto kiun ili donis al la Okcidento koncerne la sensecon kaj voluptemon de l' azianoj kompare al kristanoj; ĝuste la kontraŭo estas

* laŭ Wüster: sinonimo de teŭtona, pragermana.

prava. Neniu akuzus bestojn, kiuj ne havas psikan sinretenemon pri voluptemo en la malbona senco. Tute same, la popolo de l' Oriento estas ne-voluptema kompare al ni okcidentanoj; kaj ili estas malpli voluptemaj plie ĉar iliaj instinktoj estas multe malpli brutalaj ol la niaj. Laŭ ĉiu probableco, oni kopulacias* relative pli ofte en la Oriento; en la donitaj klimataj cirkonstancoj tio estas natura. Ĉe certaj nacioj—speciale ĉe ĉinoj kaj hindoj—la *Ars Amandi*** evoluis al alta grado, sed la faktoj kiel tiaj ne estas decidaj: tio kio gravas estas la signifo atribuata al ili. Kaj la erotika signifas por la orientano multe malpli ol por ni. Estas al li natura afero ke li havas seksajn bezonojn, memkomprenebla, ke li kontentigas ilin; kaj ĝuste pro tio ili apenaŭ okupas lian konscion. Ankoraŭ unu fojon: kiom senfine malpli volupteca estas la atmosfero de iu orienta bordelo ol tiu de iu eŭropa balo! Kiam ĉe ni virino nur montras sian ŝuon tio signifas pli ol kiam japana sinjorino nudigas sin; la plej alte kulturitaj sinjorinoj de niaj grandaj metropoloj estas pli atakemaj en interrilatoj kun viroj ol publikulino iam kuraĝus esti en la Oriento. Kaj kion se mi pensus pri Hindujo?! Kun kia mirinda saĝeco tiu ĉi popolo solvis la seksan demandon, kiom saĝe, speciale el la vidpunkto de l' spirita progreso, kiu koncernas ĝin tiom multe pli serioze ol fisankta*** kristaneco! Tie ili neniam provas perforti la Naturon ĉar ili scias de jarcentoj, kion Freud nur malkovris ĵus antaŭe, ke subpremitaj deziroj estas pli malvirtigaj en siaj efikoj ol la plej malbonaj kiuj estas libere konfesataj. En Hindujo, oni rigardas monaĥecajn tendencojn kiel nenormalajn ĉe ĉiuj kiuj ne ŝajnas esti destinitaj por esti jogio****; antaŭ la aĝo de aveco, la normala esprimo de naturaj instinktoj ne estas subpremata sed faciligata; ĉiuj baroj mankas kiujn kreas la antaŭsupozo de pekeco aŭ malbeleco de

l' amo. Anŝtataŭ ili aliaj baroj estas stariĝitaj per la supozo de la *sankteco* de la amo. La amo estas rigardata kiel dia en si mem tiel ke erotikaj figuroj en Hindujo neniam apartenos al pornografio sed al ikonografio*. Plie, en ĉiu individua kazo, la amo estas speciale sanktigata. La geedza interrilato estas kunplektita kun tiom da religiaj ideoj ke ĝia seksa elemento aperas tute spiritizita, kaj ĝuste tio kio en Kristanismo estas rigardata kiel koncesio al la pekoplana karno fariĝas rimedo de spirita progreso. Eĉ interrilato kun prostituistinoj estas sanktigata kie ĝi ŝajnas esti neevitebla (kiu kazo estas ekstreme malofta en Hindujo, kie ĉiu edziĝas frue). La pentantoj kiuj alprenis la ĵuron esti ĉastaj ne ĉiam estas tute liberaj de l' katenoj de l' sekso. Se ili forigas ilin nenature, estas la danĝero ke ilia imago, anstataŭ fariĝi pli kaj pli pura, estos konstante pli malpura, kiel en la kazo de sankta Antonio. Por eviti tion ĉi, ili kontentigas siajn pasiojn, kavazaŭ ili farus oferon, dank' al kvazaŭ-edzinoj kiuj donas sin, siaparte, pro la amo al Dio. La naturo de faktoj estas ĉie determinata per la signifo atribuata al ili: tial, ne gravas kiom malnaiva estu tiu ĉi interpreto, tiel longe kiel ĝi estas praktikata bonintence, la refalo en la brakojn de l' Naturo ne fariĝas enkatena al la spirito sopiranta liberecon. La rezultato de ĉi ĉio estas ke, en Hindujo, kun la sola escepto de l' princaj kortegoj, regas atmosfero de ne-voluptemo kiu sole klarigas kial filozofado kaj religia meditado kondukas tie al tiaj mirindaj rezultatoj. La signifo de ĉiu limigo al seksa vivo estas ke ĝi ne ludu pli grandan rolon en la tuta energio-elspezo ol tio devas okazi nature. Kaj hipertrofio de l' seksa faktoro kiu certe povas konduki al vera veneniĝo, estas malhelpata pli ol per iu ajn subpremo, per la sekurigo kaj pravigo de la normala esprimo de tiu ĉi impulso. Ĉe ni

* vidu en Wüster.

** (latina) la arto de la amo (seksa).

*** trovebla en Fulcher-Long; traduko de l' angla «sanctimonious», vorto uzata de Keyserling mem.

**** trovebla en Wüster: hinda aŝketo

* el la radiko «ikono», trovebla en la P.V. (analogie al pornografio, ktp)


tio ĉi okazas nur en geedziĝo. Estos eterna fonto de gloro por la Oriento ke ĝi komprenis kiel certigi la saman reguladon ekster geedziĝo, tiel ke egale pura atmosfero regas en bordeloj kiel en bone-kondukataj okcidentaj familioj. Ĉar ĝuste tia estas la kazo. Ne gravas kiom da faktoj oni alportu por la pruvo de l' Orienta malmoraleco—ili pravas nenion kaj povas pruvi nenion, ĉar estas la signifo de kiu ĉio dependas kaj la japana malsevereco signifas ĉirkaŭe la samon kiel la ĉasteco de frostaj angliĝoj.

Tiu ĉi bela sistemo ne estas aplikebla inter ni. Ne ĉar ni estas pli bonaj, sed ĉar ni estas tro brutalaj unuflanke, kaj, aliflanke, tro partie influitaj per la ideoj de l' kristana asketismo, kaj super ĉio, ĉar ni estas tro laŭ-faktecaj; por ni, faktoj ŝajnas esti pli signifaj ol ilia signifo. Sed ni estas, tamen, moviĝantaj en la kontraŭan direkton for de l' antaŭjuĝoj. Ĝuste nuntempe la babilado pri la amo kiel tia, vivi plenan vivon, pri la rajto de ĉiu virino al la ĝojoj de l' patrineco, estas iom troigita;

sed se la tradiciaj baroj estas forĵetataj kun ĉiuj akcesoraĵoj, kiel antaŭjuĝoj, tio ĉi nur signifas la normalan uraganan fazon preparan al la sperta kaj liberala sinteno de l' estonto. Estas sendube ke la geedziĝo estos konsiderata malpli kaj malpli kiel *conditio sine qua non** por havi infanojn; la fakto de l' virgeco estos malpli kaj malpli decida rilate al la honoro aŭ malhonoro de iu knabino; virinoj, kiel viroj, estos liberaj sekvi siajn personajn leĝojn pli kaj pli ofte. La antikvaj formoj de l' socivivo ne estingiĝos pro tiu ĉi kialo, ili daŭre ekzistados tute same kiel antaŭe, fakte ili apenaŭ suferos kvantece. Nur aliaj formoj estos konsiderataj ankaŭ kiel normalaj, ĝuste kiel la ĉefa signo de l' farita progreso en kulturo estas la ĝenerala fakto ke oni bezonas forĵeti ĉiam malpli kaj malpli da vivoformoj por rigardi sian specialan ekziston kiel pravigitan.

(*Daŭrigota*)

* latina : sola kondiĉo



La bildo montras la enirejon al la budaisma templo Kijomizu, en Kioto. Oni vidas la pordegon maldekstre, la pagodon dekstre. La loko estas tre pitoreska kaj vizitata de sennombraj vojaĝantoj.

La sprita juĝo de Ooka-Eĉizen

Kiel ni promesis al nia Legantaro en la aprila numero, ni publikigas la jenan rakonton, tradukitan el la legolibro (4-a klaso) de l' japana elementa lernejo. La RED.

Kiu estas la vera patrino?

Iam en Edo* iu virino, kiu perdis la edzon, sin dungigis kiel servistino; konfidente sian infanon al suĉigantino. Post kelkaj jaroj ŝi iris por ricevi la infanon, sed la suĉigantino pretendis, ke ŝi neniam prenis de ŝi la infanon sub sian zorgon. La konfuzita virino procesis la aferon en magistrata tribunalo. La ĉefjuĝisto estis la fame konata Ooka-Eĉizen. Li esploris la strangan aferon; kiel povus ekzisti du patrinaj por unu infano. Tamen ĉiu el la virinoj persistis ke ŝi estas la vera patrino.

Ooka-Eĉizen enpensiĝis profunde kaj deklaris:

«Sidigu la knabon inter vi, kaj vi ambaŭ tiru la manojn de l' knabo en malsamajn direktojn. Mi donas la infanon al la venkinto!»

Ambaŭ virinoj obeis. Kaj ili perforte tiris la manojn de l' knabo, ĝis ĝi eksplodis en ploregon pro doloro. La vera patrino devis lasi la manon de l' knabo. Jen la suĉigantino triumfe altiris la knabon al sia flanko.

«Hej, virino, lasu la manon de l' knabo! Vi estas friponino senkompata, kiu perfortis la infanon altiri malgraŭ ĝia plorkriado. La alia, lasinta la manon devas esti la vera patrino!»

Al tiu justa verdikto la suĉigantino humile cedis.

Ŝtona ksitigarbo**

Komizo de ŝtofvendisto ripozis antaŭ ŝtona ksitigarbo demetinte grandan pakajon apud si. Ĉar eble li estis tre laca, baldaŭ li profunde endormiĝis. Kiam li vekigis, lia pakajo ne troviĝis ĉe li. En ĝi estis 50 tanoj da kotonŝtofoj. Konsternita li serĉis la ĉirkaŭaĵon sed nenie ĝi troviĝis. Li embarasiĝis kaj sin turnis al la tribunalo por peti la esploron.



Ooka-Eĉizen aŭskultis la komizon kaj diris: «La ŝtona ksitigarbo estas suspektinda laŭ via diro, mi venigos ĝin kaj esploros ĝin!»

Li ordonis al subuloj, ke ili arestu la ŝtonan ksitigarbon. La subuloj eliris kaj ligis la ŝtonan ksitigarbon sur ŝarĝveturilon. Scivolemaj urbanamasoj vidis tion kaj kriis. «Kio? kio?» «Oni arestis la ŝtonan ksitigarbon!» «Estas tre strange, ĉu pekus eĉ la ŝtona ksitigarbo!» Kun sensenca babilado kvar-kvincent urbanoj scivole sekvis la ŝarĝveturilon kaj ili eĉ ne sciis kiam ili eniris en la tribunalon tra la pordo.

Eĉizen tuj fermigis la pordon kaj alvokis la urbanojn. Li aplombe deklaris al ili:

«Tie ĉi estas la ŝtata Tribunalo! Kial sen permeso vi eniris tien ĉi. Mi neniam permesos vin hejmeniri.»

Amaso da urbanoj tumultiĝis—aŭ ploris aŭ ĉagreniĝis. Baldaŭ el ili reprezentante la amason kelkaj personoj venis antaŭ Eĉizen kaj petis lian afablan pardonon. Li respondis:

«Por esti liberigitaj vi ĉiuj devas kunporti po unu tano da blanka ŝtofo kun siaj subskriboj. Dum tri tagoj vi pretigu la aferon.»

La provizore liberigitaj urbanoj kunportis la ŝtofon dum tri tagoj. Eĉizen alvenigis la priŝtelitan komizon kaj ordonis, ke li esploru ĉiujn ŝtofojn, ĉu la speco de l' ŝtelitaj ŝtofoj miksiĝas inter aro da ŝtofoj de la urbanoj. Fine li trovis du tanojn da ŝtofoj, kiuj estis certe la liaj. Oni venigis la portintojn de tiuj ŝtofoj kaj demandis, de kie ili aĉetis ĝin. La juĝisto demandis kaj finfine li povis aresti la ŝteliston. Post tiu saĝa solvo de l' afero Eĉizen reordonis ĉiujn kunportitajn ŝtofojn al la subskribintoj, kaj ankaŭ la ŝtona ksitigarbo starigis ĉe l' antaŭa loko. T. Kamimura

* la malnova nomo de l' nuna Tokio.

** ŝtona statuo de infan-garda-budao.

Universala Homama Asocio



*Kunigu la fratoj, plektigu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen senfine!*

UHA en Manĉurujo*

En la aŭtuno de la lasta jaro UHA-filio en *Bozisan*, Manĉurujo, establis du elementajn lernejojn, kiuj funkcias daŭre en bona ordo. Ĉar tiu provinco estas ankoraŭ ne kulturita tiel ke multaj geknaboj estas analfabetaj, tiu ĉi nova entrepreno estas tutkore bonvenigata de la tuta loĝantaro. En la lernejoj oni apoteozas Oomoto-Dion, kio multe influas la geknabojn en morala edukado, kaj ili fariĝas pli kaj pli piaj. Ĉar lastatempe ambaŭ lernejoj jam fariĝis malvastaj, la filio nove starigis la trian lernejon. Baldaŭ oni vidos pacbatalantojn, ekipitajn per UHA-spirito, kiuj vigle laboros al nia komuna idealo, la mondpaco. Ni do esperu brilan kaj fruktodonan estonton al la nova UHA-entrepreno.

Kiam nia Majstro tramigris en Mongolujon, 1924, li preterpasis *Teikaton*, kiu estas grava urbo por eniri Mongolujon. Ankaŭ tie nia movado bone progresas kaj tiun ĉi printempon oni havis pompan inaŭguron de UHA-filio en tiu urbo. Partoprenis ĝin kelkcentoj da lokaj membroj; kompreneble ne mankis inter ili ankaŭ gravuloj kiel generaloj, estroj de prefektejoj, de vilaĝoj, de lernejoj, de policejoj, ktp. Estas fakto, ke UHA-movado estas varme akceptata de ĉiuj sociaj klasoj.

* Oni uzas diversajn formojn por la nomo de l' nova ŝtato en la Oriento: Manĉurujo, Manĉuko, Manĉukuo, Manĝurio, Manĉur'io, ktp. Tamen, laŭ la logika vidpunkto, ni rekomendas al la tuta esperantistaro la unuan, t.e. Manĉurujo (la lando) kaj Manĉuro (la popolo) — troveblaj ankaŭ en la «nova vortaro japana-esperanta» de Okamoto, eldonita en majo 1935. — La Red.

Gastoj el Suda Maro

Kiel ni raportis en aprila n-ro, nia movado vigle progresas en sudmaraj insularoj. En la komenco de aprilo s-roj Huĝimoto, Joŝida (novaj membroj) kaj Mijazaki (nia sendito) vizitis nian Centron de tiom malproksima Sudo por aŭskulti semajnan Oomoto-kurson kaj samtempe partopreni nian Printempan Festegon, kiu lokon havis en la teritorioj de Ajabe kaj Kameoka dum kvin tagoj en la komenco de la sama monato. En la 18a, vespere ni okazigis bonvenigan kunvenon por ili kaj ĉiuj profundiĝis aŭskulti iliajn interesajn kaj utilajn rakontojn pri Sudmaraj aferoj.

Letero el Brazilo

S-ro Tugio Iŝido, estro de Brazila Centro de UHA, ĉiam sindoneme laboradas por disvastigi nian doktrinon, konstante vojaĝante tra la lando. Jene ni publikigas interesan epizodo, kiun li spertis dum sia propagandovojaĝo en la provincoj Goyas kaj Anapolis, en januaro (18-28).



Okaze de Oomoto Printempa Festego. Komuna manĝo en granda preĝejo «Mirokuden», Ajabe. En la mezo sidas niaj Majstro kaj Majstrino.



Ges-roj Iŝido kaj UHA amiko prof. Juakin, en Anapolis.

Dank' al lia mirinda kaj plenefika resanigo per «miteŝiro» la famo de s-ro Iŝido fariĝis tiel granda, ke kuracistoj en Anapolis komencis ĵaluzi kaj persekuti lin kaj fine ili komplotis laŭleĝe kateni lin en malliberejo. Tamen la afero malkovriĝis antaŭ la publiko. Nature multaj simpatiuloj al nia movado klopodis mildigi la aferon, precipe nia fervora amiko Olipio, justa kaj fama politikisto, mem vizitis la kuracistojn kaj policistojn. Tiamaniere ili profunde konvinkiĝis pri la vera ideo de UHA kaj la policejo donis al li jenan atestilon (la teksto estas en portugala lingvo):

«Tugio Iŝido, estro de Brazila Centro de UHA, estas permesata apliki la resanigan metodon per «miteŝiro» kun kondiĉo ne uzi medikamenton, nek fari alian kuracarton.

Eliceu Jorge Da Cunha (subskribo)
Delegado de Policia
Anapolis Estado de Goyas
(policestro de Anapolis)»

En februaro (8-21) denove li faris du-semajnan propagandvojaĝon en tiuj provincoj, kaj kiel rikolton oni havis inaŭguron de tri novaj UHA-filioj.

Raporto de Pola Reprezentanto

Koncerne mian ĉi-tiean laboron mi devas konfesi, ke la peresperanta laboro estas tre malfacila pri ĉi-tieaj specialaj malfa-

voraj cirkonstancoj. Polujo estas regiono, en kiu — malgraŭ tio, ke ĝi estas naskiĝlando de Majstro Zamenhof mem — la esperanta propagando nur tre malrapide progresas. Multaj malsamaj nacioj daŭrigas reciproke interbataladon, kaj la nacia ŝovinismo triumfas en ĉiu sfero de l' socia kaj nacia vivo.

Lastatempe la kolportado de Oomoto-libroj bone sukcesis kaj mi disvendis 10 ekz. da «Kio estas Oomoto?» kaj «Fundamento de Animo».

La propagando de l' Oomoto- kaj UHA-ideoj pere de tradukaĵoj en la ukraina lingvo donis ankaŭ bonan rezultaton. En la ukraina ĉiutaga ĵurnalo «Dilo» kelkfoje mi aperigas Oomoto-artikolojn. Krom tio de tempo al tempo mi liveras al la ukrainaj gazetoj artikolojn pri japana vivo, tradukante el O.I.

Por plie disvastigi la ideojn kaj instruojn de nia movado, mi tradukis la librojn «Kio estas Oomoto?» kaj «Fundamento de Animo» en ukrainan lingvon kaj farinte kelkajn kopiojn da tiuj tradukaĵoj, mi prunte donas la manskribaĵojn al miaj verserĉantaj konatuloj-samnacionoj, por ke ili lernu kaj ekkomprenu la Dian veron kaj instruon.

Tiamaniere mi laboradas laŭeble, almenaŭ en ĉi-tiu direkto, por pli kaj pli alproksimiĝi al la dezirata celo. Samtempe mi promesas mian pluan laŭpovan kunlaboradon por nia sankta komuna afero.

Denysiuk Les, Bolechow, Polujo.



«Toomei-den», nova domo de Majstro O. Deguĉi, en Oomoto-teritorio de Kameoka. Ĝi elkonstruiĝis en marto de tiu ĉi jaro. Dekstre vidiĝas la granda placo «Tökōden».

Parolas la Legantaro

«Mi gratulas vin el mia tuta koro pro la sukceso de via konservado de la revuo ĉiam belaspekta, riĉenhava, tolerema, vere internacia en la kunlaborado, starigante la veran fundamenton de la nova kulturepoko tutmonda. Kiam la mondo parolas pri militoj, intrigoj, malamo, permesu Dio, ke ni daŭrigu nian paclaboradon internacian, ĉar kelkaj semoj certe restos kaj iam aperos frukto benata» — I. G. Bra., R. Braz.

*

« En nia grupo ĉiuj kuraĝe laboradas por nia esp.-movado kun ĉiama sukceso. Nia agado pli kaj pli faras bruon, oni ekatentas pri ni — oni plu ne konsideras nin kiel revulojn aŭ frenezulojn sed kiel apostolojn. Niaj kontraŭuloj ekkomprenas ke nia entrepreno ne estas afero pure lingva sed ideala, spirita aspiro, kies celo estas alte lokita. Ili ekkomprenas ankaŭ ke nia sukceso (ankoraŭ ne granda sed certa) ripozas sur bazo firma kaj nun ne detruenda; tio sufiĉas por nin kuraĝigi . . .

Hodiaŭ mi sendas monon por mia abono al O. I. kiu estas, laŭ mi, unu el la plej perfektaj gazetoj.» — A. Mit., P. Fran.

*

«La artikolo «Aŭroro vidiĝas» en marta n-ro de O. I. memorigas min pri la sekva afero. — Ankaŭ en nia lando la gazetara opinio pri Japanujo iom post iom ŝanĝiĝis kaj lastatempe ege mildiĝis. Antaŭ kelkaj monatoj ĝenis min akra tono uzata rilate la komercajn intertraktadojn pri japana importado. Tamen feliĉe tia miskomprenado estas jam pasinta kaj nuntempe oni prezentas favorajn artikolojn pri Japanujo kun belaj bildoj. Kiel specialaĵon mi mencias ke por intertraktadoj japanaj kaj nederlandaj, kiuj tiutempe ne bone marŝis,

japanoj subite postulis la uzon de sia lingvo. Ili certe ne diskutis nederlandlingve kaj supozeble jam provis diversajn aliajn lingvojn. La koncernan gazetartikolon mi sendis al la estraro de la estonta Roma Kongreso, por eventuale servi kiel kongresmaterialo» — C. A. Hac., B. Javo.

*

«Antaŭen marŝu Japanujo! Vi estas brava, honesta, kuraĝa nacio. Vi pravas en viaj agadoj kaj vi havas kaj havos ĉiujn bonpensantajn popolojn kun vi.» — E. Maun., G. Ang.

*

«Enmaniginte la libron «Sinjoro Laŭdata» mi ne scias kiel vin taŭge danki. Mi rigardadis la belan blankan paperon, la klarajn bone lokitajn literojn, la dignan kovrilon, kaj ĉe ĉio, brileton el oro. Mi tuj diris al mi, se la Oomotanoj ĉiam laboru tiel arte kaj fidele, ili ne povos ne venki, ili ne povos ne sukcesi, ili ne povos ne atingi sian celon fru-malfrue. Jes, tia gento certe atingos sian celon

Plie, kiel mi sentas veran plezuron kaj grandan ŝaton, rigardante belkreskantajn floron ĉe herbo kaj frukton ĉe arbo, tiel mi sentas plenan ĝojon, ekvidante noblajn produktojn de fidela, lojala laboro.

Traleigante tiun elegantan eldonaĵon, tuj mi sciiĝis pri la 6-jara mallibereja vivado, kiun suferis la estimata majstro O. Deguĉi. Mi sciiĝis, ke li fine venkis la sorton. Mi sciiĝis, kiel li triumfis ĉe sia 60-jara datreveno. Kaj mia koro simpatie pulsas pro lia kariero plena je fido al Dio kaj laborado por la homaro. Mi elkore bondeziras al Li kaj al ĉiu Oomotano, ripetante la frazon «Antaŭen fratoj! Ĉiam antaŭen!»

Pri la organo O. I.: Mi ŝatas ĝian facilan Esperanto-stilon kaj ĝian ĉiaman interesplenan enhavon.» — *J. Eli., W. Aŭstralio.*

Opiniloj pri «Oomoto Internacia»

«Mi ĉiam legas kaj studas la gazeton O. I., kies riĉa enhavo ne nur estas interese, sed plenvalora. Oni povas trankvile aserti, ke O.I. nuntempe estas unu el la plej bonaj Esp.-gazetoj internaciaj laŭ ĉiuj vidpunktoj, dank' al la bonega redaktado...» — *F. Bach., H. Germ.*

«Vere O.I. estas la gazeto interesa, kleriga, edifa... kaj mi volas sendi al miaj eksterlandaj amikoj tian bonegan gazeton por prezenti Orientan Spiriton...» — *T. Doo., S. Jap.*

«... Mi tre ĝojas ke mi povas, per legado de O.I., posedi perfektan stilon de Esperanto, kaj ankaŭ studadi Orientan kulturon, precipe vian ŝatatan movadon, enhavantan belajn principojn de l' nobla homamo. Mi esperas ke via altvalora gazeto O.I. helpas min plene en tiu rilato...» — *J. Ziem., S. Pol.*

«... Mi tre gratulas ke O.I. tiom sub-

tenas spiritisman laboron en la mondo por intereso de la nova homaro.» — *P. Bal., B. Hung.*

«... Mi plezure verkas por O.I., ĉar mi ankoraŭ deziras disvastigi scion pri la Oriento en la Okcidento. Ju pli homoj komprenas unu la aliajn, des pli ili vidos komunajn sentojn kaj idealojn. Per la artikoloj en O.I. mi lernis multon pri japanaj kutimoj kaj pensmaniero. O.I. estas modele presita, ilustrita kaj plena de informoj.» — *E. L. Osm., E. Ang.*

«... Mi deziras koni la orientan vivon kaj tiucele abonas O.I. Ĝi ankaŭ estas gazeto tre bonenhava, literatura kaj filozofia, kio min ege interesas. Bonvolu donaci kelkajn ĉkz., ĉar mi deziregas rekomendi ĝin al miaj esp.-kursanoj.» — *A. Aud., V. Fran.*

«... La artikoloj en la lastaj numeroj de O.I. pri «spiritismo» tre plaĉas al mi. Estas videble, ke baldaŭ venos la nova tempo starigita de novaj pensoj de bonaj homoj. Oomoto estas unika trezoro de bonaj homoj. Mi nur deziras do la plej grandan bonon por nia kara Majstro kaj nia sankta movado.» — *R. Gar., N. Ĉeĥo.*



Kore sinĉonati dankon, mi petas, peri al via althonorata

sinjoro Hidemaru Deguĉi pro la donace sendita, delikata propiama desegnaĵo, kiu mi ŝatas kiel ĉionan trezoron.

Troppau, en marto 1935.

Ĉeĥoslovakio

Erna Keilich.

Preskaŭ ĉiuj ricevintoj de la donacoj de Sinjoro Hidemaru Deguĉi (vidu O. I. febr. p. 32) sendis al ni sincerajn dankvortojn.

La maldekstra karto montras unu el ili, memfarita kaj sendita de s-ino Erna Keilich, Troppaŭ, Ĉeĥoslovakujo. Dankesprimo unuflanke, or-desegnaĵo aliflanke.



Literatura Kritiko

*Ni recenzas ĉiujn duope ricevitajn librojn,
unuope ricevitajn nur mencias. La Red.*

★ SVEDA ANTOLOGIO. Sub redakto de Sam Jansson, Bjarne Beckman, Arne Lenner kun konsilo de Ferenc Szilágyi, Oscar Bünemann, Tiberio Morariu, Henrik Seppik kaj kun kunlaboro de 40 helpantoj. Vol. 1 (de 1-a Parto de tempo 1880-1920), kiun sekvos ankoraŭ 2 Partoj (-tempoj ĝis 1880 kaj post 1920). 228 paĝ. Broŝurita sved. Kronoj 5. —, tole bindita 6.50. Eldona Societo Esperanto, Stockholm.

La nomita eldonejo jam ĝuas altan reputacion de la internacia legantaro, eldoninte bonajn librojn, kiel «Tra sovaĝa Kamĉatko», «Per balono al norda poluso», kaj tiun reputacion neniom difektas sed certe multe pli altigas la nuna laboro, kiu povas esti fiero ne sole de la svedaj samideanoj, sed ankaŭ de la tutmonda esperantistaro. Eldoni unulandan antologion estas laboro nesupozeble malfacila, en multaj rilatoj, elekto de materialoj, akiro de taŭgaj tradukantoj, pretigo de sufiĉe granda eldonkapitalo, kaj samtempe timo pri nefacila vendiĝo, ĉar la neevitebla grandeco de la libro konsekvencigas karan prezon. Do antaŭ ĉio ni gratulas kaj laŭdas la bravecon de la societo, kiu spitis tiujn multajn malfacilaĵojn — por la plej valora riĉigo de nia literaturo.

Pri la preso kaj la papero, ni povas senhezite diri, ke ili estas unuaklasaj kaj krom tio oni faris bonan elekton, uzante kompare grandajn literojn. Preseraroj, se ne malestas, troviĝas nur kelkloke, cetero negravaj k.c. Pĝ 24. linio 20, la limo (devas esti la limoj). Pĝ 36 lin. 10, sangiĝas (ŝangiĝas). Pĝ 36, lin. 26, da Karlo (de Karlo). Pĝ 50, lin. 7, dominus (Dominus).

La lingvo estas sufiĉe aŭ eĉ tre bona, la stilo agrabla, escepte malgrandan parton. Ankaŭ neologismoj ŝajnas zorge evititaj, kvankam mi ne atentis nervece pri ili. Almenaŭ mi, malgraŭ kun malriĉega vortprovizo en la cerbo, povis rapide legi konsultante la vortaron nur de tempo al tempo ĉe iom specialaj vortoj kiel floraj aŭ herbaj nomoj. Jen estas du tri punktoj, ĉe kiuj mi haltetis. Pĝ 66 antaŭlasta linio «... sed ŝi ne vidis ian malhelpon al la amado en tri ĉambroj por pli malalta lupago ol en du por pli alta.» «ol» devus esti «anstataŭ

aŭ «kompare» aŭ «ol tiu por du ĉambroj.» Pĝ 69, linio 24 «Ŝi bonŝance diras ni.» «ni» devus esti forigita aŭ, mi ne scias. Pĝ sama, lin. 30 «Ŝatobriando» netrovebla en Plena Vortaro.

Nun, oni devus mencii iom pri la enhavo laŭ literatura vidpunkto. Sed ne estante studinto de la sveda literaturo en la originalo, mi ne kompetentas juĝi, ĉu oni faris bonan aŭ malbonan elekton el la verkoj de tiuj aŭ aliaj verkistoj. Rajtas mi nur esprimi, kun kia sento mi legis, kiel laiko. Kaj mi diras, ke mi legis kun ĉiam pli kreskanta intereso la grandajn geaŭtorojn kiel August Strindberg, Gustaf af Geijerstam, Victoria Benedictsson ktp. Kaj mi, vivanto en la ekstremoriento, nature pli interesiĝis kiam mi flaris ĉe ili la krudan kaj samtempe fortan odoron, kiun oni povus nomi skandinavia, kaj kiŭ cetero ne mankis tra la volumo. Mi varme rekomendas al ĉiuj samideanoj pri tuja mendo kaj samtempe esperas, ke rapide sekvos la ceteraj volumoj planitaj. (N. Ito)

★ HIROKAZU KAJI: JAPANA-ESPERANTA VORTARO. Unua parto (A-G). Eld. Esperanto-Kenkjuŝa, Tokio. (1935 febr.) Favorprezo: yen 0.60 (Havebla ĉe «Oomoto Internacia».)

Post dek jaroj da longa atendado, nun aperis tiu ĉi vortaro. Tamen, ho ve! ĝi enhavas nur la unuan parton, sesonon de la vortrezoro. Kun bedaŭro mi devas diri, ĉu oni povas plene utiligi la vortaron, en kiu mankas la aliaj kvin sesonoj. Do mi espregas ke la eldonejo sekvigu la aliajn partojn laŭeble plej baldaŭ. Tiurilate mi memoras la Wŭster-Vortaron, kiu haltas ĉe la duonvojo, ankoraŭ ne aperas la fina parto (L-Z), kaj malgraŭ ĝia enhavo ampleksega kaj kompleta, ĝia valoro malmultiĝas.

Pri la literado de P indiko: p. 64 «Detchi», — kia sistemo ĝi estas? I.aŭ la antaŭparolo ĝi devas esti «Decchi». Esperanta aŭ Japansistema literado estas bonvena, miaopinie.

La formato estas normala, la preso kaj papero belaj kaj la enhavataj vortoj estas ne tre multaj sed bone elektitaj. Nur la poparta eldono estas bedaŭrinda. (T. Kami.)

p. 117: «kredi je la atingo». Sur p. 61 oni legas: «iliaj konscioj estas okupataj» — mi konfesas, ke mi ne estas certa ĉu en tia okazo la pluralo estas ĝusta aŭ ne; ĉu iu konsilos min? — «Ein BRAVES Kind» estas tradukebla kiel «bona infano» kaj certe ne «brava infano» kiel la aŭtoro supozas (p. 73). «Gefrata familio» estus pli ĝuste «la familio de l' fratio». Sur p. 107 ni legas «artikolo» kaj «artiklo» sinsekve; iom da konsekveneco necesas ĉe la uzo de neologismoj (permesataj aŭ nepermesataj). Sur p. 110 «antaŭtage» povas signifi ANTAŬTAGMEZE aŭ HIERAŬ; kiu el la du? La preseraro sur p. 109 estas precipe ĝena: «mondvaĝulo» povas esti MONDVOJAGULO aŭ MONDVAGULO. La frazo «tium aŭ alian erarojn» estas erara gramatike; post KAJ necesas pluralo, post AŬ nepre singularo. Sur p. 148 «resopiri» devas esti SOPIRI ĉar — laŭ la esp.a derivado — RE rilatas al SOPIRO, ne al la SOPIRATA OBJEKTO. Kiam oni rigardas en la P.V. «sopiri» kaj «aspiri», nia supra aserto fariĝos tute klara. Oni ne «bone kondukas kontraŭ iu» sed (RILATE) AL IU. «Kaoso», sur p. 162 estas malbona, eĉ la P.V. NUR mencias «ĤAOSO». «Centimetroj en kvadrato» estas KVADRATCENTIMETROJ kaj la formo «legeblis la nomo» (p. 168) estas lingva stenografio.

Post mia detala kritiko mi refoje altiras la atenton de legantoj kaj aŭtoro al miaj laŭdoj en la komenco. Memorante tiujn, ili pli facile elportos la lastajn.

(J. Major)

★ JAN WOLSKI: ĈU ĜI ESTAS NUR FABELO? Kooperativa Junular-romano. El pola originalo tradukis K. R. Babrowski. Eld. Esperanta Eldon-Kooperativo, Varsovio. Prezo: 3 sv. fr., 14x 19.5 cm, 157 pĝ (15 pĝ por rimarko pri la teksto).

La aŭtoro estas aŭtoritato de Kooperativa scienco en Polujo. Traleginte la libron mi konstatis, ke vere ĝi estas kooperativa junular-romano kaj «devas esti mondo tia!» La skemo de l' romano estas interesa historio de saĝa instruisto en iu kampara lernejo: lia fervoro edifis malbonajn geknabojn, kaj per unuigita forto de l' instruisto, la geknaboj kaj ankaŭ la tuta vilaĝano, ili fondis kooperativon, kaj dank' al ĝia naskiĝo ili ĝuis pacon kaj harmonion. Abunde da karikaturaj en la libro donas ĝajan humoron kaj neniam enuigas la legantojn ĝis la lasta paĝo.

Estas tre neŝatinde, ke la tradukinto ofte faras kvazaŭ-neologismajn vortkunmetojn. Alia rimarko estas ke pollingva influo malhele ombros tra la libro. Tro ofte aperas «ci», kio estas eĉ malagrabla; «vi» sufiĉas.

Malgraŭ tiuj pikoj, la ideo en ĝi enhavata estas tre bonvena kaj ni varme rekomendas ĝin al la Esperantistaro.

(K. Taka.)

Tra la Gazetaro

ESPERANTO, Ĝenevo. Organo de UEA. Post la reorganizo la paĝnombro iom malpliigis, tamen ĝia aŭtoritateco neniam difektigas. La oficiala informo, aperanta ĉiunumere, estas kompasoj de nia Movado. En marta n-ro ni legas romaneton «Blanka Pavo» de E. Privat, ĝia eksredatoro. La aŭtoro ĉiam montras sian grandan talenton kiel verkisto kaj stilisto en nia lingvo.

HEROLDO DE ESPERANTO, Köln, Germ. La sola, semajna, sendependa, ilustrita organo de Esp.-movado. 4-8 pĝ, tagjurnalata formato. Ĝiaj diversaj freŝdataj raportoj el Esp-ujo meritas nian dankon. HdE nun festas sian duopan jubileon: ĝi fariĝis jam dekkvin-jara plenkreskulo kaj la redaktoro Teo Jung renkontis la dudekkvin-jaran datrevenon de sia Esp-ista vivo. Gratulon!

NIA GAZETO, NICE, Fran. Sub lerta redaktado de S. Grenkamp ĝi aperas regule ĉiunumere kun abundo da interesaj legaĵoj. «Lingva Konsilanto» estas utila rubriko por komencantoj. La marta estas speciala pola numero. Nur plibona papero kaj plibela preso estas dezirindaj!

L' ESPERANTO, Milano, Ita. 4 paĝoj, granda jurnalata formato, monata, teksto—esp-e kaj itale. Precipe lastatempe ĝi havas gravecon, ĉar ĝi plej detale informas pri la 27-a Kongreso en Romo. Petu specimenon al: Esp.-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano.

LA SUDA STELO, Slav. Brod, Jugo. Organo de l' esp.-movado en Jugoslavujo. Ĉiam zorge redaktata kaj internacie rekomendinda. En ĝia febr. n-ro, oni mencias interalie «Oomoto», kiel tre legindan esp-gazeton. Tamen Oomoto estas la nomo de nia Homama movado, gvidata de majstro Onisabro Degučić. Nia gazeto estas «Oomoto Internacia». Do bonan memoron!

KOMIZA GAZETO (apr.) Nun aperis nova internacia fakgazeto (4 paĝa, trimonata) por la tutmonda komerca popolo. Ĝi enhavas plurajn porfakajn artikolojn de diverslandaj kunlaborantoj pri la vendarto, ktp, kiuj certe estas interesaj por fakuloj. Red.: E. Fredin, Fako 34, Gunnarstorp, Sved. Specimeno I resp.kup.

HUNGARA HEROLDO, Budapeŝt. Reaparita kiel trimonata revuo kun subtitolo «Mezeŭropa Revuo». Detale raportas pri hungara esp.-movado. Oni strange mencias nian gazeton O. I. sub «Miraĵoj kaj Ŝmirajoj» en du sinsekvaj numeroj. La skribinto atente tralegu niajn numerojn, ĝis li konvinkigos pri niaj sinceraj motivoj kaj pri sia miskompreno!

★ Hans WEINHENGSTO: TUR-STRATO 4. Originala romano. Formato 20 x 13 cm. 172 paĝoj kun dukolora kovrilo. Eldonis Literatura Mondo, Budapest. Prezo: broŝurita sv. fr. 3.50, bindita 5.- (aldonu 10% por sendkostoj).

Kiel la eldonejo rimarkigas en speco de antaŭparolo, tiu ĉi romano de ankoraŭ nekonata aŭtoro estas «ne nur promeso pri lia talento, sed ankaŭ bela kaj valora plenumiĝo». La romano estas realisma kaj pesimisma: ĝi priskribas la vivon de loĝantoj en Viena lu-kazerno kun mallumaj koloroj. La fino estas kompreneble tragika: preskaŭ ĉiuj personoj mortas pro malsano aŭ malfeliĉo. Esperanto NE estas menciita en la verko. Jen ĝiaj MERITOJ.

Oni povus riproĉi al la romano ĝian mallongecon; ĝi ja estas longa novelo pli ol romano. Tia temo postulus ne 170 sed 400 paĝojn por esti adekvate traktata. La mallongeco klarigas do, ke la personoj ne estas sufiĉe psikologie traktataj. Sed en sia simpleco, la verko estas tamen juvelo. Krom kelkaj nenaturaj frazoj, oni nenion povas riproĉi al la aŭtoro el pure literatura vidpunkto (ekz. patrio deklamas al sia familio: «Mi jam konscias, ke mi devas enkonduki aliajn morojn ĉe ni!» — nu, ĉu oni parolas tiamaniere?). La naturpriskriboj estas ĝustaj sed iom mallongaj, kontraŭe la priskribo de radioaparato estas eĉ teknika; eble la aŭtoro mem estas grandurbano kaj industria laboristo, kio klarigas liajn profundajn konojn pri la vivo de VIE-NAJ proletoj.

Se oni kredus, ke la mizero elvokas la saman sociostaton ĉe ĉiu popolo, oni tamen grave erarus. La sistemo de lu-kazerno estas specialaĵo kiu originas el Rusujo kaj kiu infektas Vienon kaj Budapeston. En Parizo kaj Londono la mizero de l' amasloĝado prenas jam tute aliajn, multe pli diskretajn formojn. En Tokio kaj Osaka tia sistemo tute ne ekzistas; la proletoj loĝas en lignaj dometoj. Kvankam multaj el ili troviĝas en multe pli malbona situacio ol la personoj priskribataj en la romano, neniam ili kondutas tiel aĉe kiel la vienanoj en Turstrato. La diferenco estas serĉenda en rasaj karakterizaĵoj. Japanoj estas pli diskretaj pri siaj familiaj aferoj ol okcidentuloj, ili eltenas la mizeron pli facile, ili mortas prefere ol vivi en malhonoro. «Legomsupo kaj terpomoj kun butero» kiel ankaŭ «kolbaso kun pano, kukoj membakitaj kaj pomoj» estas eble mizera dieto en Turstrato, sed, pipo kaj papo! — se mi nur havus ilin tie ĉi, kiam mi recenzas tiun ĉi verkon, mi cer-

tigas, ke mi bone amuziĝus!!!

La emocio de l' personoj en la romano estas troigita. Neŭiu el ili povas regi siajn nervojn; ĉie oni ploregas, svenas kaj insultegas. En la reala vivo la bildo ne estas tiom malserena. Precipe ĉe japanoj, koleraj kaj emociaj scenoj estas preskaŭ neniam videblaj. Sed ankaŭ en Vieno, la nombro de l' neŭrasteniuloj ŝajnas esti precipe alta en Turstrato...

Stranga opinio estas esprimita en la libro pri Marta kaj Karlo, kiuj post kelksemajna angla lernado havas jam «mirinde ĝustan elparolon» — kvankam ili estas memlernantoj (kaj Marta lernis nur de aŭstro). Konsiderante la fakton, ke eĉ inter la anglaj samideanoj nur malmultaj havas «mirinde ĝustan elparolon» (ĉu ne Kenelm-Robinson?) en sia propra lingvo — eĉ ne parolante pri Esperanto — oni miras pri tia aserto flanke de esperantista aŭtoro. Cetere, kelkaj preseraroj (??) supozigas, ke la aŭtoro ne havas bonan elparolon en Esperanto: p. 61 «longpeka» (beka!), p. 114 kombreneble (p!).

El pure lingva vidpunkto, oni povas diri, ke la aŭtoro apartenas al niaj plej bonaj stilistoj. Se li tamen faras erarojn, tio nur pravas, ke la nivelo de «niaj plej bonaj aŭtoroj» estas bedaŭrinde malalta en la nuna fazo de nia lingvo. NEOLOGISMOJ troviĝas modere: pigra, fraŭdi (france «frauder», tradukita de Grosjean-Maupin kiel ŜELTROMPI!), gemuta (tradukita en la Germana-Esp. vortaro de Dro E. Pfeffer kiel AGRABLA; tiu vorto troviĝas nek en la angla nek en la franca lingvoj!!), nervoza (laŭ P. V. = NERVA), zorgumi (laŭ P. V. = ZORGI), konjunkturo (laŭ Wüster = ŜANCOJ), eskapi (france «échapper» tradukita de Grosjean-Maupin kiel SIN FORSAVI DE, ELGLITI aŭ simple EVITI).

Aliaj lingvaj strangaĵoj estas la sekvaj: «nure», «sekvinta», «kanajlino» kaj «kato» (en la sama frazo; kial ne «katino?»), «vazaro» anstataŭ TELERARO kaj «nokta poto» anstataŭ NOKTA VAZO. «Li havis tempon da pli ol unu horo» estas frazo ne nur kun malĝusta vortordo sed eĉ kun gramatika eraro (akuzativo post «da»). «Ĉar» kaj «tial» en la sama propozicio estas pleonasmo (p. 29). ALIEL kaj KEIKIU estas SAT-ajoj sed ne esperantaj. «Vivi je la graco de aliaj» estus pli ĝusta kiel «vivi dank' al la favoro de aliaj» — ĉar GRACO havas pure religian sencon laŭ la P. V. kaj «je» devas esti uzata nur pri tempo kaj loko — laŭ rekomendo de Dro Kalocsay. Alia eraruzo de «je» troviĝas sur

Japanana lingvo por Esperantistoj

«La japana lingvo — kun sia kurioza gramatiko, malcerta origino, antikva literaturo — estas lingvo inda al pli da atento ol ĝi ricevis ĝis nun.»

Prof. B. H. Chamberlain.

(33)

Postpozicioj

Kiel oni jam scias, la japana lingvo apartenas al la familio de la aglutinaj lingvoj (kiel ankaŭ Esperanto) kaj ĝia karakterizaĵo estas la uzo de postpozicioj anstataŭ la prepozicioj konataj al eŭropanoj (kaj Esperantistoj).

Ĝis nun ni jam citis diversajn postpoziciojn kaj nun alvenis la tempo por ilin pritrakti sisteme. Antaŭ ĉio ni klasigos la multspecajn postpoziciojn de la japana lingvo kiel sekvas:

- 1). Kazaj finaĵoj (*wa* = nominativo; *wo* = akuzativo; ktp)
- 2). Veraj postpozicioj (*to* = kun; *made* = ĝis; ktp)
- 3). Kvazaŭ-postpozicioj (vidu tie)

Nominativa postpozicio «Wa»

«*Wa*» estas postpozicio kiu montras nominativon. Ĝi povas stari ne nur post substantivoj sed eĉ post aliaj partoj de la parolo (krom kelkaj esceptoj, ekz. post *mo*, *demo*, kaj aliaj).

Kiam du substantivoj kuniĝas pere de *to* = kaj, «*wa*» de l' nominativo sekvas nur la lastan substantivon:

Uma to Usi wa Kemono desu.
ĉevalo kaj bovo besto(j) estas.

Krom montri nominativon «*Wa*» ankaŭ servas por akcenti iun specialan vorton de la propozicio:

- a) «*Mina wakarimasen*» signifas, ke mi nenion komprenas sed
- b) «*mina wa wakarimasen*» signifas ke «tuton mi ne komprenas» (nur parton).

(Ni esperas, ke neniu lernanto de nia Kurso uzos la unuan propozicion parolante pri ni !!)

Absolut-Kaza postpozicio «Ga»

«*Ga*» estis antikve postpozicio montranta genitivon. Tiu senco postrestas hodiaŭ nur en kelkaj vortoj, ekz.:

(*Waga Kuni* = patrolando: *wa* = mi, *ga* = de, *kuni* = lando).

Hodiaŭ «*ga*» servas por akcenti substantivon; kiam ĝi sekvas vorton oni diras, ke tiu vorto estas en la Absoluta Kazo:

Nippon^① *ni wa Kuma*^② *ya*^③ *Okami*^④ *ga, ooi*^⑤ *ga, Tora*^⑥ *wa orimasen.*

① = Japanujo; ② = urso; ③ = kaj; ④ = lupoj;
⑤ = multaj; ⑥ = tigro.

Oni rimarku, ke «*wa*» povas stari post *ni* = en, plie *Kuma ya Okami ga*, kie *ga* emfazas du substantivojn kunigitajn per *ya* = kaj, la dua «*wa*» post *Tora* signifas kontraŭe, tute alian aferon: en tiu okazo ĝi plenumas novan rolon kaj estas tradukebla per «sed» (= «*sikasinajara*»).

Ga + aru = havas

La Absolut-Kaza postpozicio «*ga*» kaj la verbo *aru* = estas signifas posed-rilaton kaj estas tradukeblaj per «havi»:

Ano Hito wa kane ga aru. = Li (tiu homo) havas monon.

Genitiva postpozicio «No»

En la japana lingvo genitivo estas uzata por kvin diversaj rilatoj inter vortoj:

- 1) posesivo: *Oomoto no Hombu* (*Hombu* = centro).
- 2) subjektivo: *Watakusi no kaita Hon* (libro de mi «skribita»).
- 3) objektivo: *Gakko no Miti* (vojo al la lernejo).
- 4) atributivo: *Gin no Tokei* (horloĝo el arĝento).
- 5) eksplikativo: *Tamba no Kuni* (la provinco *Tamba*). (*Daŭrigota*)

KORESPONDADO

Anonceto kostas 2 respondkuponojn (ĝis 3 linioj).

Abonanto de O.I. rajtas senpage publikigi anoncetojn dufoje en la jaro.

Mallongigoj: L=letero, PK=poŝtkarto, PI=poŝtkarto ilustrita, PM=poŝtmarko.

Nur kun orientaj gesamideanoj deziras korespondi, pri literaturo, politiko, ktp., per L kaj PI. S-ro Diniz Cupertino, R. Aval da Cima, 284, Portugalujo.

La Esperantigita verko de H. T. Hamblin «Interne de vi la Potenco» aperas serioforme ĉiumonate per la Gazeto «JUSTITIA EST AMOR». Ekzemplero havebla kontraŭ unu internacia poŝtkuponon de: S-ro Knoest, Nicolaistraat 79, Den Haag, Nederlando.

24 jara nederlandano deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj, per L aŭ PK. Certe respondos. S-ro Theo Slijkerman, Benningbroek B 77, Nederlando.

Deziras korespondi kaj interŝangi belajn bildojn de vidaĵoj kun la tuta Azio, Afriko kaj Aŭstralio. Certe respondas. S-ro O. Carlacini, Via G. Marconi 33, Pisa, Italujo.

Adres-ŝanĝo: de Praha-Strasnice 94, traŝloĝis al la sekva nova adreso: S-ro Karel F. Straka, Praha-Sporilov 1874, Ĉeĥoslovakujo.

Juna, 29-jara studento deziras trovi geamikojn en Oriento kaj Sudo; korespondas angle, esperante, germane pri ĉiu temo. S-ro Jan Ziembicki, Stryj, Kruzywa 11, Polujo.

Kun japanaj gesanoj deziras korespondi, s-ro Olivio de Melo, Rua do Rosario 102-2, Rio de Janeiro, Brazilo.

Ĉu vi jam legis miajn libretojn? Se ne, mendu tuj

«Esperanto en Turkujo»

ĝin bezonas nepre tralegi ĉiu esperantisto. Prezo 1 respondkuponon.

«Malgranda Adamo»

rakonto, legolibro por komencantoj. Prezo 2 respondkuponoj.

«Esperanto-Kursa Lernolibro»

por memlernantoj. Prezo 4 respondkuponoj.

Afrankite sendas: Stjepan Mišak,

Esperanto-Eldonejo, ADANA, Turkujo.



IA POŬTO

☆ S-ro F. Bach., H. Germ.: Ni bone ricevis la gazeton «Arbeitertum» en kiu aperis interesa artikolo pri Japanujo. Ni japanigis ĝin kaj publikigis en nia japanlingva monata organo «Ŝoŝŭa», eldonnombro 200,000. Dankon pro via afabla propono: Jes, volonte ni ricevos ilin, kiuj ni povos iamaniere utiligi.

★ S-ro L. Fra., K. Ĉeĥo.: Bedaŭrinde la ricevita artikolo estas ne publikigebla. Ĉu vi ne bonvolus skribi alian, nepolitikan?

★ S-ro C. A. Hac., B. Javo: Dankon pro la sendaĵoj. Jes, nia movado estas tolerema kaj neniam hezitas kunlabori kun iu ajn movado, se la celo estas mondpaco, homara bono... Kaj profunde ni volas informi pri B.-movado kaj atendegas viajn bonvolajn tradukaĵojn kaj la du nomitajn verkojn en Esp. Anticipan dankon!

★ S-ro K. F. Str., P. Ĉeĥo.: Ni bone aranĝis la aferojn. Temas pri la kvara peto: nia presejo ne havas la literojn kun renversita supersigno.

★ S-ro J. Eli., W. Aŭstralio: Ni ricevis kelkajn manuskriptojn, kiujn ni ne povas publikigi bedaŭrinde, ĉar parte ni evitas tendencaĵojn kaj aliparte gardas nian stilon laŭfundamenta kaj pure Zamenhofa...

★ S-ro R. Gar., N. Ĉeĥo.: Bedaŭrinde ni ne povas plenumi vian peton (sendi tiel grandformatan, bejan bildon de Budao). Ne estas malkara afero! Aŭ estas pagota post ricevo?

★ S-ro C. C. Cow., T. Aŭstralio: Dankon pro via p.k. Ni atendegas detalan kaj senprokrastan informon. Bonvolu urĝigi la jurnalejon.

★ S-ro W. Wed., E. Germ.: Danke ni kvitancas vian pagon por UHA-insigno.

★ S-ro E. Maun., G. Ang.: Ni dankas vin pro via afabla poŝtkarto de konsolo pri la tertremo en Formoso. Koran saluton!

★ AVERTO AL NIAJ MONSENDINTOJ, precipe el anglaj kolonioj: Okaze de la pago per poŝtmandato, nepre bonvolu aparte informi nin pri la afero.

★ POST TRALEGO. Kio al vi plej plaĉas — Kio malplej plaĉas — Kio mankas, en «Oomoto Internacia»? Skribu vian opinion! La RED.

Enhavo

Kio estas la civilizita mondo?	3	La sprita juĝo de Ooka-Eëizen	25
Ora spegulo	4	Universala Homama Asocio:	26
Niaj filantropiaj Suverenoj	6	UHA en Manĉurujo	
Ideoj tra Esperantujo	10	Gastoj el Suda Maro	
Orienta filozofio (5)	13	Letero el Brazilo	
Filozofio de l' vivo	14	Raporto de Pola reprezentanto	
La ĉapelo mortas	18	Parolas la legantaro	28
El la batalfronto de l' fundamentanoj	19	Literatura kritiko	30
Japanujo (8)	20	Japana lingvo por Esperantistoj (33)	33

NIAJ REPRESENTANTOJ

Aŭstralio S-ro L. Thomson, c/R; Rawson, 169 Exhibition str. et. Melbourne.	S-ro Anton A. Ehm, Zittau. Sa., Bahnhofstr. 32.	Jugoslavujo S-ro Marko Dominia, Split Zrinjska Str. No 1 d.
Aŭstrujo D-ro Carl Mimler, Wien VIII, Albertgasse 1-a, S-ro Bernhard Selzer, Ettenreichgasse, 4, 31 Wien X	S-ro Gottlieb Strofsner, Munchen S. 50. Bavarujo, Dietramszellestr. 10. 21.	Latvujo S-ro Karlo Subergs, Riga, Milgravis azera str. 6--1.
Brazilo S-ro Majumi Kondo, Caixa postal 3594, S. Paulo.	S-ro K. O. Schmidt, Brixstr. 8 a, Flensburg. S-ro F. Bachmann, Bahnhofstr. 5/1. Heilbronn.	Litovujo S-ro Andrius Borkauskas, Pakruojaus g. 3. Radviliškia.
Bulgarujo S-ro Ivan Kirov, Popska, 484 Sliven. S-ro Georgi Donĉev, str. oficerska 25, Tirmovo. S-ro Atanas Nikolov, Sevlievo, Burgas.	Hindujo S-ro Liem Tjong Hie, Semarang, Karangtoeri 66, Java.	Nederlando F-ino G. de Waart, Box 23, Hilversum.
Ĉeĥoslovakujo S-ro Rudolf Burkert, Kalvariengasse 34-IV, Nie- mea. S-ino Sofie Cibera, Plzen III, Zizkova 52.	Hispanujo S-ro Francisko Miralles, Hellin (Albacete). S-ro Salvador Viladelmas, Colon 52-54, Sabadell (Bar- celono).	Novzelando F-ino Coralie Smythson, 47A Aurora Terrace, Wellington, C. 1.
Franĉujo S-ro Simon Frantz, 21, rue Alain Chartier, Paris XV.	Hungarujo S-ro Paŭlo Balkanyi, Pošto 507, Budapest.	Persujo S-ro Dariuŝ Nemseĉi, Tabriz.
Germanujo S-ro Kurt Wuensche, Augustenstr. 17, Leipzig-R.	Ĥinujo S-ro Sh. M. Chun, N.Y.M.S. Lunghuwa, Shanghai.	Polujo S-ro Adolf Oberrotman, Varsovio, Krak—Przedm 10 S-ro Denysiuk Les, Bolechow, ul. Stryjska 12.
	Italujo S-ro Luigi Minnaia, Via del Giglio 16, Roma 115. S-ro Giulio Matuella, Corso Garibaldi 325, Mazzolombardo (Torento).	Svisujo S-ro Karl Jost, Stolzesstr. 7, Zurich 6.
		Usono S-ro John Lester Lewine, 150 E. 72 nd. St. New York S-ro K. A. Suzuki, Orange Petroleum Co. Ora- nge (Texas)

OOMOTO INTERNACIA

Abontarifo:

Unujara abono = 5 sv.fr., aŭ egalvaloro.

Subtena abono = 20 sv.fr., por 5 jaroj.

Dumviva abono = 50 sv.fr.

Anonctarifo:

Reklamo: 1 paĝo = 30 sv.fr., 1/2 paĝo = 15 sv.fr.

Anonceto: ĝis 3 linioj = 2 respondkuponoj.

Monon sendu per poŝtmandato, se neeble, per monbiletoj aŭ respondkuponoj, rekte al la Adm.:
Oomoto Internacia, Kameoka, K'oto-hi, Japanujo.

INTERŜANĜO

Ni interŝanĝas reklamon kun tutmondaj Esperanto-gazetoj. Dezirantoj sendu al ni anonctekstojn. Ni estas ĉiam pretaj por reciproka servo. «Oomoto Internacia»

定價 壹部 貳拾錢 壹ヶ年貳圓四拾錢
昭和十年六月一日印刷 昭和十年六月一日發行
編輯發行印刷人 高木鐵男 京都府南桑田郡龜岡町
荒塚字内丸一
印刷發行所 天聲社 (振替大阪75917番) 全

Nepre havinda verko de ĉiuj homaranoj!

Sinjoro Laŭdata

Literatura trezoro, kun originalaj poemoj kaj frazoj de ĉ. cent esperantistoj.

Luksa eldono, ore surprisita, tole bindita, 200 paĝa. Kompilita de nia ĉefredaktoro Koogecu Nišimura. Granda prezmalaltigo: 1.50 sv. fr. aŭ egalvaloro.

Mendu ĉe: Librofako de Oomoto Internacia, Kameoka (Kioto-hu) Japanujo.

A b o n u

la komplete reorganizitan revuon

Vegetarano

Dumonata revuo por Vegetarismo kaj Parencelaj ideoj.

Oficiala organo de Internacia Vegetara Ligo Esperantista.

Multaj fakaj legaĵoj altvaloraj.

Jarabono: 3 sv. fr.

Specimeno Senpage.

«Vegetarano», Ion Ionesku-Kapatzana, Villa Zamenhof, Sisteron (B. A.), Francujo.

Ĉu vi volas esti feliĉa en la edzeco?
Se jes, senprokraste mendu

EDZECAN VIVON

libreton por personoj nur pli aĝaj ol 16 jaroj. Prezo 2 respondkuponoj af-rankite. Adreso: Stjepan Mišak, Esperanto, ADANA (Turkujo).

La sola esperanta revuo por Ĉeĥoslovakujo estas

LIGILO

12-16 paĝa. Multaj informoj pri esp.-movado en ĈSR. Aparta literatura aldono. Abonkotizo (10 n-roj jare): 3.-sv. fr. Mendu ĉe:

«LIGILO», Prostejov, Ĉeĥoslovakujo.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Geinstruistoj tutmondaj!!

Sendu instigojn kaj artikolojn pri instruista kaj lerneja temoj el via lando, raportu pri ĉio, kio estas grava por la eksterlando,

sciigu pri la disvastiĝo de esperanto inter instruistoj kaj lernejoj,

al la administranto: P. Korte (lernejestro), Schoolstraat 13, VEENDAM, Nederlando.

Svenska Esperanto-Tidningen La Espero

Organo de svedaj esp-istoj, bone redaktata, aperas ĉiumonate, en 16 grandformataj paĝoj, plejparte en Esperanto, kun multaj interesegaj legaĵoj kaj belaj ilustraĵoj. Jarabono: 3 sv. fr.

Petu specimenon kontraŭ resp.kup.

Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm, Svedujo.

HEROLDO

La sola, semajna, sendependa, universala, ilustrita organo de la Esperanto-movado. 4-8 paĝa, taggazeta formato, kun 7 specialaj aldonoj por ĉies gusto. Jarabono: 10 gmk.

Monata Heroldo

Esperanto-gazeto por komencantoj kaj por malriĉuloj. Multaj interesaj artikoloj kaj bildoj. 10 paĝoj en la formato de semajna Heroldo. Jarabono: 2 gmk.

Specimeno kontraŭ resp.kupono.

Heroldo de Esperanto,
Köln Brüsseler Str. 94, Germanujo.

